

# EL POPOLA ĈINIO


中國報

10  
1998

ISSN 0032 - 4361



**Denove pri reenoficiĝo**  
Regno forgesita de historio  
Ĉinoj ŝatas kolektadon



Vespera krepusko de Lijiang-rivero

Foto de OU YANG

## INTER NI

Ŝajnas al mi ke EPĈ bone evoluas kaj en 1998 fariĝis eĉ pli bela ol antaŭe. La revuo estas tre multflanka kaj la bildoj ne povas esti pli bonaj.

**RAITA PYHÄLÄ**

(Finnlando)

Por mi en Eŭropo tre interesaj estas viaj kulturo, kutimoj, historio, via lando kaj kontaktoj kun homoj el aliaj landoj. Mi ŝatas legi pri arkitekturo, naturo kaj bestoj.

**EUGENIUSZ PIASECKI**

(Pollando)

20 sanigaj ekzercoj estas tre utilaj kaj necesaj. Mi legas ĉiujn artikolojn el la rubriko "Laŭ la Silka Vojo" kaj vojaĝas kun vi. Bonegaj estas bildoj kaj fotoj de n-ro 3. Per la rubriko "Fo-

toj Faritaj de E-istoj" mi konatiĝis kun multaj landoj.

**NINA JELISSEJEVA**

(Belorusio)

EPĈ donas al legantoj realan bildon pri Ĉinio. Pruvo de mia aserto estas fakto, ke ĉeĥa semajna gazeto "SPIRIT" publikigis plurajn artikolojn, kiujn mi tradukis pri ĉina masaĝo ktp.

**KOCVARA DRAHOMIR**

(Ĉeĥio)


Ĉinio estas simila al Brazilo, grandega lando. Ĉu vi povas aperigi rubrikon pri kuriozaĵoj pri Ĉinio, nome "Vi scias ke...", kaj ankaŭ paĝon pri enigmoj kun libro-premio?

**CAIO MATOS**

(Brazilo)

# El Popola Ĉinio

10 [481] 1998



Familio en terdomo

Foto de Han Hong

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P. O. Kesto 77,  
Beijing 100037, Ĉinio


Telefono kaj telefakso:  
+86-10-6832 1808

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

# ENHAYO

- 2 **INTER NI**
  - 4 Denove pri reenoficiĝo
  - 7 **EKONOMIE:**  
"Silicia Valo" de Ĉinio;  
Kurantaj aferoj; Hidroelektrejo Ertan
  - 10 **ĈINAJ E-ISTOJ:**  
Mastrumado de granda familio
  - 11 Mi amas vin (Poemo)
  - 12 Ĉu Zamenhof scipovis naĝi aŭ navigi?
  - 13 **ORIGINALE VERKITAJ:**  
Poemoj el Vjetnamio
  - 14 **SUR NIA LIBROBRETO:**  
Katalogo de ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto
  - 15 **POR KOMENCANTOJ:**  
Promeso kiel vento
  - 16 **ESP-NOVAĴOJ**
  - 17 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**  
Pri ĉinaj papertondaĵoj
  - 20 Regno de vegetaloj
  - 24 Iamaj senlaboriĝintoj stevardas en aviadilo
  - 25 En Manzhouli
  - 28 Ŝanĝiĝo de grenovendejo
  - 29 Cizhou-bakujo hodiaŭ
  - 32 Mirindaj terdomoj
  - 35 En la urbo Jiande
  - 36 **MULTNACIA ĈINIO:**  
Ĉinaj rusoj
  - 38 **JUNULARO:**  
Aromo de virinoj
  - 39 **KORESPONDI DEZIRAS**
  - 40 Ĉinoj ŝatas kolektadon
  - 42 **ORDINARAJ ĈINOJ:**  
Elstara dancistino
  - 44 Rakonto pri ŝakludo en la oficejo
  - 46 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
  - 48 Regno forgesita de historio
  - 50 Verkisto-urbestro
  - 51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**
    - Ĉinaj aviadiloj; Ĉinaj aŭtoj
  - 2 Vespera krepusko de Lijiang-rivero
- SUR LA DORSKOVRILO:**  
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]  
Krakovo — malnova urbo;  
Pejzaĝo en Alpa-montaro



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

1. Ningxia (p. 48)
2. Jiande (p. 35)
3. Ertan (p. 8)
4. Manzhouli (p. 25)
5. Xishuangbanna (p. 20)

# Denove pri reenoficiĝo

**N**IA revuo kelkfoje faris raporton koncerne reenoficiĝon en Ĉinio. Hodiaŭ mi pli detale pritraktos la temon, okaze de la 5-jariĝo de praktikado de la projekto "reenoficiĝo".

## NEEVITEBLA REFORMADO

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 ĝia registaro praktikis la politikon "malalta salajro, vasta enoficiĝo", kiu konformis al la ŝtata cirkonstancaro sed ne al la ekonomia leĝo. Pro plimultiĝo de loĝantaro, en entreprenoj pli kaj pli serioziĝis la problemo "superfluo de laborantoj", t.e. "enofica senlaboreco". Tio ne nur influis produktan efikon, sed ankaŭ kreskigis inertecon.

Fine de la 70-aj jaroj Ĉinio komencis reformadon kaj pordmalfermon por transiri de la planizita ekonomio al la merkata. Depost 1986 la ŝtato donis al entreprenoj krediton anstataŭ subvencion, por ke ili partoprenu merkatan konkurencon kaj mem respondecu pri profito kaj defecito. Konkurenco malkaŝis ĉiujn problemojn de la ŝtataj entreprenoj: ripetada konstruado, superflua laborantoj, eluzitaj maŝinoj, postiĝintaj teknikoj ktp. Nemalmultaj serioze deficitaj entreprenoj estis bankrotontaj. Tial la registaro kuraĝigis, ke bone



En laboranto-varbejo

profitantaj entreprenoj aneksu deficitajn. En 1996 kaj 1997 ĝi donis respektive 20 kaj 30 miliardojn da juanoj por likvidi la monon ŝulditan de la bankrotintaj ŝtataj entreprenoj al banko kun la celo bankrotigi tiujn entreprenojn longe malprofitantaj kaj superflue konstruitajn, racie dispozicii kapitalan strukturon kaj labor-fortojn kaj rapidigi la disvolviĝon de la nacia ekonomio. Tio neeviteble kaŭzis senlaborecon kaj cirkuladon de laborantoj.

## MALFACILA ENOFICIĜO

Laŭ plano, de 1998 la ĉina registaro uzos tri jarojn por liberigi plejparton da grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj el mal-

faciloj kaj fondos en ili fundamentan sistemon de moderna entrepreno. Sur la plano baziĝis la projekto "reenoficiĝo".

Ĝis la fino de 1997 en la tuta Ĉinio 11.51 milionoj da homoj senlaboriĝis. Ili plejparte laboris en la pez-industria distrikto de nordorienta Ĉinio, en la industriaj distriktoj de la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio, en ĉemaraj kaj centraj urboj, kie koncentriĝis tekstilaj entreprenoj. Tamen en Ĉinio la premforton de enoficiĝo kaŭzis ne nur entreprena depresio, sed ankaŭ aliaj faktoroj: Unue, la loĝantaro kreskis de 540 milionoj en 1949 al preskaŭ 1.3 miliardoj. En la 90-aj jaroj pli kaj pli multiĝis laborpovaj junuloj, kiuj naskiĝis en la "naskokulmi-

naj” 60-70-aj jaroj. Krom havi aĝan avantaĝon en enoficiĝo, parto da ili ankaŭ ricevis altlernejan edukadon. Due, en la kamparo estas 130 milionoj da superflua laborantoj, kies parto enfluas en urbojn. Kun malalta salajra postulo kaj eltenemo de peniga laboro, ili estas iasence superaj en enoficiĝo. Ekz. en Pekino en 1997, 180 mil homoj senlaboriĝis, dume 720 mil kamparano-laborantoj estis dungitaj. Ĉar katenite de malnova koncepto multaj urbanoj ne volas sin okupi per laboroj penigaj kaj malalte salajrataj, tial pli malfaciliĝas ilia reenoficiĝo.

## SISTEMA PROJEKTO

Pro neperfekto de soci-garantia sistemo en Ĉinio, la vivo, kuracado kaj reenoficiĝo de senlaboriĝintoj bezonas subtenon kaj kunordigadon de la registaro kaj societoj. Tio signifas, ke “reenoficiĝo” estas sistema projekto. Ĝin makroskope reguligas la ŝtato.

En 1993 la Ŝtata Konsilantaro instrukiis al la Labora Ministerio elfari la projekton “reenoficiĝo” kaj post du jaroj praktikis ĝin en la tuta lando. Nun en ĉiuj provincoj kaj municipoj fondiĝis speciala organizo por gvidi praktikadon de la projekto.

Antaŭ sia reenoficiĝo senlaboriĝintoj renkontis problemon de vivtenado. Tial naskiĝis asekuraj sistemoj por senlaboruloj, por kuraco kaj por vivo post emeritiĝo. Ankaŭ la Ministerio pri Civilaj Aferoj laŭ internacia kutimo elfaris sistemon “fundamenta vivgarantio de urba loĝantaro”. Konforme al tio aperis “Labora Leĝo”, “Asekura Leĝo por Senlaboruloj”, “Leĝo por Instigi Enoficiĝon” ktp. por defendi la rajtojn de senlaboriĝintoj.

La imposta departemento difinis: senimpostigi en tri jaroj la nove fonditajn entreprenojn,

60% de kies dungitoj estas senlaboriĝintoj; senlaboriĝintoj kun senlabora atestilo havas la privilegion ricevi komercan licencon; la imposta kaj industri-komerca departementoj liberigas ilin de koncernaj impostoj en difinita tempo.

Ankaŭ sociaj organizoj ludas gravan rolon. La Tutlanda Federacio de Laborsindikatoj iniciatis movadon “doni helpon” kaj la lokaj laborsindikatoj ĉiamaniere kolektis monon por helpi senlaboriĝintojn, starigis trejnan bazon por transposteniĝo kaj entreprenojn por enoficiĝi senlaboriĝintojn. Ili ankaŭ interkonsiliĝis kun koncernaj departementoj por liberigi malriĉajn familiojn de domlupago, pago por akvo- kaj elektro-konsumo, kuraca pago kaj lernopago de infanoj, aŭ redukti tiajn pagojn.

La Tutlanda Virina Federacio lanĉis movadon “virinoj establu entreprenon” kun la celo helpi milionon da senlaboriĝintinoj reenoficiĝi antaŭ 2000. La Tutlanda Junulara Federacio praktikis trejnan planon “fariĝi pioniro por prosperiĝo de entreprenoj” kaj “prosperigi mil mez- kaj malgrandajn entreprenojn”.

## PRAKTIKADO KAJ DISVOLVO

Certe estas malfacile reenoficiĝi tiel multajn senlaboriĝintojn. Malgraŭ mankoj la lokaj registaroj penadas solvi la problemon.

En la ekonomie relative evoluinta Ŝanhajo senlaboriĝintoj estas plej multaj. Tial koncernaj departementoj de la urbo kune monhelpis por starigi “administran centron por senlaboriĝintoj”. La partoprenantoj povas ne nur ricevi monon por fundamenta vivtenado kaj por kuracado, kontinuiĝi asekuron por kuracado kaj por vivo post emeritiĝo, sed ankaŭ senpage lerni teknikojn, serĉi enoficiĝajn ŝancojn per laborinforma reto en la centro, aŭ esti rekomenditaj de la centro al dungantoj.

Por garantii la vivon de laboruloj la registaro de Qingdao reduktas konstruadon de domoj kaj aĉeton de aŭtoj. Ili pagis por oficoj de senlaboriĝintoj: La privataj entreprenoj, kiuj dungas senlaboriĝintojn kaj subskribas kun ili laboran kontrakton por tri jaroj, povas akiri de la registaro certajn pagojn.

La urbo Jilin (Ĝjilin), nord-

### Trejnado de senlaboriĝintoj por helpi ilin retrovi okupon





lamaj senlaboriĝintoj nun servas kiel zorgantoj de verdejo

orienta Ĉinio, estas malnova industria bazo peze ŝarĝita. La urbestro laboras kiel ĉefo kaj aliaj urbaj gvidantoj kiel vicĉefoj de la “organizo por helpi senlaboriĝintojn kaj ilian reenoficiĝon”. En Tianjin kaj Xi’an, la urbaj gvidantoj persone respondecas pri specialaj senlaboriĝintoj.

La entreprenoj, por kiuj necesas redukti laborantaron, ankaŭ ĉiamaniere serĉas vivrimedojn por la senlaboriĝintoj. La Chongqing(Ĉongĉing)-a Ŝtala Kompanio, profitante la geografian superecon, investis por fondi la Turisman Kompanion de Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero kun ŝipoj, hotelo, restoracioj, amuzejo kaj feriejo, kaj liveris pli ol 2 000 oficoŝancojn. Kun profito la kompanio ankaŭ funkciigis manĝ-kompanion kun loka gusto, ĝiaj filioj dissemiĝas en la tuta lando. La ĉinaj karbaj entreprenoj, dank’ al la terciara industrio entreprenata de 880 000 senlaboriĝintoj, profitis en 1997 post 7-jara defcito.

La bankrotinta Pekina Dentobrosa Fabriko estas aneksita de Quanjude-grupo de Rostita Pekina Anaso. La grupo dungis ĉiujn senlaboriĝintojn de la fabriko kaj

trejnis ilin en lertajn laborantojn.

La senlaboriĝintoj plejparte estas mezaĝaj kaj malalte klerigitaj, ĝenerale mankas al ili lerteco. Tiuokaze la registaro plifortigis edukadon de plenkreskuloj. Ĝi prenis kiel la plej gravan taskon ŝanĝon de enoficiĝa koncepto de edukatoj, kaj instruis ilin per praktikeblaj teknikoj, kiaj kuirarto, tajlado, hejma servo, riparado de elektraj aparatoj ktp.

Laŭ nekompleta statistiko, nun en entreprenoj estas 5 000 teknikaj kolegioj por laborantoj, kaj 20 000 trejnaj bazoj por transoficiĝo. En la socio troviĝas ankaŭ diversaj trejnaj organizoj. En la lando pli ol 20 altlernejoj partoprenis la trejnadon de transoficiĝo. Lastatempe la Labora Ministerio elfaris projekton por trejni 10 milionojn da senlaboriĝintoj. Dume en Ĉinio aperis 34 mil labor-agentejoj.

Dank’ al helpo de la tuta socio, plejparto de la senlaboriĝintoj eliris el la deprimito kaj malespero. Ilia koncepto por elekti oficon fariĝis pli reala kaj malferma. Por senlaboriĝintoj de ŝtataj entreprenoj jam estas nature kaj kompreneble fariĝi vartistino aŭ servistino en restoracio. Iuj senlaboriĝintoj iris

kampon por ter-kultivado aŭ fiŝbredado. Laŭ statistiko, ĝis la fino de 1997, jam 4 335 000 senlaboriĝintoj denove enoficiĝis. La reenoficiĝa procento en Ŝanhajo estas 90%, tiu en Tianjin kaj Haikou — 80%.

En la pasintaj jaroj ĉinoj pli profunde komprenis, kion signifas senlaboriĝo kaj reenoficiĝo. Ili konscias, ke ekonomia disvolviĝo estas la nepra solvo de reenoficiĝo. Fakuloj diris, ke en la venontaj jaroj en Ĉinio la relative pli allogaj oficoj estos: privataj entreprenoj kaj kompanioj, urba familia metiindustrio kaj turismo. Kaj la unua estos ĉefa vojo por reenoficiĝo; la lasta liveros 1.4 milionojn da oficoŝancoj antaŭ 2000 pro tio, ke ĝi povas puŝi la disvolviĝon de trafiko, restoracioj kaj popola metiarto.

Tamen la neignorebla fakto estas, ke la ĉagreno pri loĝdomo, asekuro por vivo post emeritiĝo kaj por kuracado ankoraŭ malhelpis laborantojn de ŝtataj entreprenoj iri al privataj entreprenoj. Tial la ŝtato klopodas perfektigi ĉiujn soci-asekurajn sistemojn kaj koncernajn leĝojn por pli bone solvi la problemon de senlaboreco, ankaŭ kiu estas la plej granda malfacilaĵo en la reformado. ■

### Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio “Esperanto-Maró” volas kunlabori kun ĉiuj E-organizoj kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, CN-310009 Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio

Telefono: +86-571-7071705

Telefakso: +86-571-7035995

# “Silicia Valo” de Ĉinio

de JI PING

**E**N nordokcidenta Pekino es-tas Zhongguancun, kie si-tuas 232 institutoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj 73 altlernejoj. Fine de la 70-aj jaroj, kelkaj esploristoj de iu instituto ekokupis sin pri “komerco de komputeroj”. En tiu kampo ili estas pioniroj en Ĉinio kaj kompreneble tiam ili estis tre atentataj personoj en la ekonomia reformado. En la sekvaj dekelkaj jaroj, en Zhongguancun multiĝis komputeraj kompanioj. La institutoj kaj altlernejoj ludas gravan rolon en la ekonomia disvolviĝo. Zhongguancun fariĝis distrikto de novaj altaj teknikoj de Pekino kaj ricevis la titolon “Silicia Valo de Ĉinio”.

En majo de 1985, tie fondiĝis la Haidian-a Scienc-Teknika Eksperimenta Distrikto de Pekino. Pro la bona situo, elstaraj fakuloj kaj favora politiko pri imposto, al la distrikto rapide venis teknikoj kaj kapitaloj el Ĉinio kaj aliaj landoj. Tie fondiĝis ĉ. 5 000 entreprenoj pri novaj altaj teknikoj. Zhao Pei, vicprezidanto de la kompanio Unisbok, diris, ke la fondintoj de la kompanio estas instruistoj de Qinghua-universitato. Ili komencis per miliono da juanoj, kaj nun la totala posedaĵo de la kompanio valoras 380 milionojn da juanoj. En la distrikto, preskaŭ ĉiutage kreiĝas nova produktaĵo.

Wang Dianru estas unu el la pioniraj entreprenistoj en la distrikto kaj prezidanto de iu kom-

panio. Foje alilanda entreprenisto vizitis Ĉinion kun orkolora kulero galvanizita per jono kaj diris al Wang, ke se Ĉinio bezonas ĝin, li liveros. Wang neniam vidis tian kuleron, tamen li scias, ke la jono-galvaniza tekniko de Ĉinio estas sufiĉe avangarda. Estas tre grave, ke ĉina entreprenado frue okupu la merkaton. Tiel lia kompanio pene laboris kaj fine puŝis la ĉinan jono-galvanizan teknikon al aplikado.

La Kompanio (Grupo) Legend estas granda fama entreprenado en la distrikto. En 1990, kiam multaj tieaj kompanioj nur muntis komputerojn, ĝi jam havis propran produktaĵon. En 1995 ĝia vendokvanto atingis 100 000.

Ĉiujare multiĝas je 50% la produktokvanto de softvaroj de iu kompanio pri edukado.

La elektronika ĉinlingva eldona sistemo de la Kompanio Fonder lanĉis revolucion en gazeta rondo de Ĉinio.

Multaj komputeraj sistemoj disvastiĝas tra Ĉinio.

Antaŭ novaj defioj, la entreprenistoj en la distrikto atingis komunan opinion: unue, altigi kreivon, rapidigi grandampliigon kaj internaciigon de la entreprenoj; kaj due, formi merkaton de altteknikaj produktaĵoj kaj koncernaj materialoj. Per tiu vojo la entreprenoj de informo kaj novaj altaj teknikoj de Ĉinio rapide kreskos. ■


## Kurantaj aferoj

● Ĉe la fino de majo de 1998, la rezervokvanto de fremdaj valutoj de Ĉinio jam superis 140 miliardojn da usonaj dolaroj. Bonordas la ĉinaj enspezo kaj elspezo internacie. Stablas la kurzo de *Renminbi* (la ĉina mono).

● La plej profunda ĉina puto por prospektado de petrolo estis borita en Tarim-baseno en Xinjiang. Ĝi profundas 7 200 metrojn tra 9 sedimentaj tavoloj formiĝintaj dum la pasintaj 570

milionoj da jaroj. Tio donas valoran geologian materialon.

● En la venontaj kvin jaroj, la ĉina registaro investos 250 miliardojn da juanoj (8.2 juanoj = 1 usona dolaro) por konstrui fervojojn. En 2002, la totala longeco de fervojoj estos 70 000 km (nun 65 000 km). Oni klopodas ekkonstrui en 2000 1300-kilometran ekspresan fervojon inter Pekino kaj Ŝanhajo.



# Hidroelektrejo Ertan

Teksto de **CHUAN JIANG**

Fotoj de **HAN HONG**

**I**U diris, ke la ĉefa tasko de Ĉinio pri hidroelekto estas “edziniĝi tri filinojn” — finkonstrui tri grandajn elektrejojn ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero, Longtan en Guangxi kaj Ertan en Sichuan. Nun “la plej juna filino” Ertan-hidroelektrejo la unua “edziniĝis” — ĝia unua generatoraro kun kapacito de 550 000 kW jam ekfunkciis, la aliaj kvin generatoraroj ekfunkcios sinsekve en ĉiu kvara monato. La totala produktokvanto de elektro estos 17 miliardoj da kWh.

Ertan-hidroelektrejo situas sur

Yalong-rivero, branĉo de supra Yangzi-rivero. Ĝi donos pli da elektro al Sichuan kaj Chongqing, al kiuj delonge mankas elektro.

Fakuloj diras, ke Yalong-rivero estas energioriĉa, kaj sur ĝia malsupra parto 412-km-longa oni povas konstrui kvin hidroelektrejojn, inter kiuj Ertan estas la plej granda.

La impona baraĝo en formo de parabolo povas konservi 5.8 miliardojn da kubmetroj da akvo. Ĝi okupas la trian lokon inter la samspecaj baraĝoj en la mondo.

La plej granda malfacilo es-

tas manko de mono. La monrimedoj de Ertan venis de la centra kaj loka registaroj de Ĉinio kaj kredito de la Monda Banko. Laŭ la internacia sistemo, la Hidroelektra Kompanio Ertan estas la posedanto, kiu invitas plenumantojn de la tasko. La konstruadon partoprenas 600 inĝenieroj el 38 landoj kaj 5 000 laborantoj el Ĉinio.

Dum la konstruado ne vidiĝas multaj homoj, sed multaj kamionoj kaj maŝinoj. Koncernaj projektoj pri medioprotekto kaj setlado samtempe iras glate. ■



Konstruado de akvo-ellasa kluzo



Instalado de maŝinoj



Kunlaboro kun alilandaj inĝenieroj

# MASTRUMANTO DE GRANDA FAMILIO

de WANG JIANBING

**W**EI Jianhua estas ĝenerala sekretario de la Tangshan-a Esperanto-Asocio, Hebei-provinco. En la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto, okazinta en Tangshan, li ludis gravan rolon. Ĉiujare li okazigas kurson de Esperanto en Tangshan. En Esperantujo li estas sindonema. Ĉi-sube mi konigas al vi la bonkoran kaj helpeman Wei Jianhua ekster Esperantujo.

En la okuloj de Sun Fengying, Wei Jianhua estas entuziasma kaj honesta edzo. Kiam ŝi konatiĝis kun li, li estis instruisto de Esperanto. Ŝi opiniis, ke li estas fidinda, kaj fariĝis lia edzino. En la lastaj dekelkaj jaroj ŝi bone konis lin. Por helpi aliajn li estas tre malavara.

Ili vivas ne riĉe. Wei Jianhua laboras en la Federacio de Sociaj Sciencoj de Tangshan. Lia monata salajro estas nur iom pli ol 600 juanoj. La laborejo de Sun Fengying ne bone funkcias kaj ŝi ne povas ricevi salajron akurate. Ilia filino lernas en la 5-a klaso de elementa lernejo kaj por tio ili devas pagi multe. Feliĉe iliaj gepatroj havas pension kaj ne bezonas ilian monhelpon.

De 1998 oni ne plu favorpreze luigas loĝejon. Por aĉeti la loĝejon Sun Fengying kaj Wei Jianhua devas pagi preskaŭ dekmil juanojn. Antaŭe ili trovis, ke la loĝejo estas malvasta. Post la tertremo okazinta en 1976, ili eklovis ĝin, kiu areo iom pli ol 30 kvadratajn metrojn kun mal-



Wei Jianhua (la kvara de dekstre) kun siaj lernantoj

grandaj kuirejo, vestiblo kaj dormoĉambroj. Se ĝi estus pli granda, ili ne havus sufiĉe da mono por ĝin aĉeti.

La domo estas simple meblita. 12-cola nigra-blanka televidilo estas okulfrapa, tamen malbone funkcias.

Kvankam ilia salajro ne estas alta, tamen ili ŝparas iom kaj pagas por 36 lernantoj.

En 1994 li informiĝis pri "Projekto de Espero", iniciatita de Fonduso de Evoluo de Ĉinaj Geknaboj. La raportaĵoj el ĵurnaloj kaj radioj kortuŝis lin. Li decidis finance subteni malriĉajn lernantojn por fini ilian lernadon. Unue li monhelpis 4 lernantojn el Hebei-provinco, poste 32 lernantojn el Qinghai, Sichuan,

Shaanxi kaj aliaj 13 provincoj kaj regionoj. Li diris, ke kiam li sendis monon al la lernantoj, li rememoris, kiel liaj gepatroj prizorgis lin, kiam li estis en la Interna Mongolio.

18-jara, Wei Jianhua laboris en stepo de la Interna Mongolio. Post 6 jaroj li fariĝis pli grandanima. Tio influas lian edzinon. "Li ne fumas, nek drinkas, nek ludas maĝangon, eĉ malofte rigardas televidon. Li ne multe zorgas pri siaj manĝo kaj vesto, tamen por helpi aliajn, li estas malavara," la silentema Sun Fengying laŭdis lin. Tamen monhelpi 36 lernantojn ne estas facile. Dum ferioj iuj el ili vizitis Wei Jianhua, la malgranda domo estis homoplena, kaj la lernantoj devis dormi sur

planko. Prepari manĝon por ili estis lacige. Sun Fengying pensis, ke tio ne gravas, ĉar ili ne longatempe loĝas tie.

Ili volas monhelpi po unu malriĉan lernanton en ĉinaj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj, kaj 11 en ĉefaj urboj de Hebei-provinco. Ili pensas, ke indas helpi lernantojn fini lernadon. Wei Wei, ilia 11-jara filino, aprobas tion.

Vespere Wei Jianhua skribas leterojn al lernantoj. Iuj lernantoj vokas lin instruisto, aliaj — oĉjo, triaj — paĉjo. Wei Jianhua kaj lia edzino sentas, ke ili faras ne multe.

Wei Jianhua faris registrojn pri ĉiuj lernantoj, cele informiĝi pri iliaj familioj kaj lernado, kaj konservi iliajn leterojn. Li ŝatas

diligentajn lernantojn. La lernantoj, kiujn li monhelpas, lernas ĉefe en la 2-a klaso de malsupera mezlernejo. Li pensas, ke tiam ili jam konas la gravecon de lernado. Li preferas pagi por lernemuloj.

Wei Jianhua kaj lia edzino ĝojas, ke tiuj lernantoj povas daŭre lerni. Inter ili dekkelkaj jam eniris en universitatojn, dum festoj Wei Jianhua ricevas salutkartojn de tiuj lernantoj.

Oktobre de 1995 Wei Jianhua vojaĝis al Hunan-provinco por partopreni kunvenon kaj ĉe la okazo li volis viziti Chen Yongzheng, mjaŭ-nacian knabon. Li marŝis 40 km sur montvojo kaj atingis la hejmon de Chen Yongzheng. La gepatroj de Chen Yongzheng petis lin forkonduki

Chen Yongzheng por serĉi vivrimedojn. Pro tio li gastigis Chen Yongzheng en sia hejmo por 10 monatoj.

Julie de 1999 Xie Boxing el Tongjiang-gubernio de Sichuan-provinco diplomiĝos de universitato. Li estas la 4-a universitata diplomiĝonto, monhelpata de Wei Jianhua. En 1994 Wei Jianhua ekhelpis lin. En 1995 Xie Boxing eniris en la Pekinan Agronomian Universitaton. Alveninte Pekinon, Xie iris al Tangshan por viziti Wei Jianhua. De tiam Xie Boxing vokas Wei Jianhua patro. Se li daŭre studos, Wei Jianhua daŭre vivtenos lin.

Wei Jianhua diris, ke ili stariĝas specialan familion kaj li volas esti mastrumanto de la familio. ■

NICOLE HARDY\* (Francio):

## *Mi amas vin*

*Kial estas kvar sezonoj?  
Sensignifa por mi estas  
la tempo...*

*Hejmen ekpaŝis la suno  
Ĉar mi amas vin, sinjoro,  
Ĉar mi amas vin.*

*“Senhistoriaj estas la  
feliĉuloj”*

*Ĝin vi leterskribis al mi.  
Neeblas ke mi mal-  
samopiniis  
Sinjoro, tial, ĉar vi amas  
min,  
Tial, ĉar vi amas min.*

*En la tutmondo, kiom da  
geoj*

*Ne eltrovis siajn  
feliĉtagojn,  
Koncerne min, ĉirkaŭen  
elkrii deziras*

*Sinjoro, ke mi vin amas,  
Ke mi vin amas.*

*Ĉiuj noktoj, kiam vi pri  
mi songas,  
Ĉiuj noktoj, kiam mi pri  
vi pensis,  
Tiel dolĉaj en mi estas,  
Sinjoro, ĉar mi tute*



La aŭtoro

*apartenas al vi,  
Ĉar mi tute apartenas  
al vi.*

\* La aŭtoro estis gajninto de la unuagrada premio de la 7-a konkurso de EPC-legado. Ŝi mortis la 7-an de julio 1998 pro kancero. La poemon ŝi skribis en la franca lingvo antaŭ 20 jaroj okaze de sia fianĉiniĝo kaj ĝin esperantigis ŝia edzo Pierre Hardy por omaĝi al ŝi.

# Ĉu Zamenhof scipovis naĝi aŭ navigi?

**P**RI kiu Zamenhof temas? Ĉu pri iniciatoro de la neŭtrala lingvo Esperanto — d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kies naskiĝ-datreveno ni festas ĉiu-jare la 15-an de decembro kiel “Internacian Tagon de Esperanta Libro”?

Ĉu pri lia filo Adamo Zamenhof — kuracisto kaj direktoro de malsanulejo en Varsovio, pafmortigita de hitleranoj probable en Palmiry en 1942?

Ĉu pri lia nepo vivanta kaj laboranta en Francio kiel inĝeniero de petrol-plataĵoj — s-ro Ludoviko Zamenhof-Zaleski?

Ĉu pri la setlejo-vilaĝo troviĝanta ĉe la franc-hispana limo — nomata Zamenhof, de kie verŝajne devenis avo de la familio — Fabian Zamenhof, kiu siatempe ekloĝis en la urbo Tykocin (nun en Pollando) — ŝajna naskiĝ-urbo de d-ro L.L. Zamenhof (laŭ esploroj de prof. Ludo-

viko Siekierski el Gdanska Politekniko)?

Ne, — temas pri m/s Zamenhof, kiu naskiĝis en la jugoslava ŝipfarejo en Split, julie de 1959.

Jugoslaviaj ŝipfaristoj donacis al la nov-naskita grandan portreton de d-ro L.L. Zamenhof.

De novembro 1959 la moderna ŝipo apartenas al CHIPOLBROK (Pola-Ĉina Kompanio de ŝip-makleristoj) kaj feliĉe 82-foje navigas ĉefe al Malproksima Oriento. Ĝia ŝipanaro zorgante pro la bela ŝipo vojaĝas ĉiujare ofte pli ol 9 monatojn al la orientaj havenoj kiel: Pusan, Dalian, Xingang, Qingdao, Ŝanhajo, Hongkong kaj Singapuro — poste al Casablanka, Antwerpen, Rotterdam, Hamburg, Helsingborg ĝis Gdynia. De la patrina haveno Gdynia ĝi navigas denove al: Helsingborg, Hamburg, Rotterdam aŭ Antwerpen ĝis la Nigra Maro kaj Mediteraneo. Kaj poste

ĉarmas grandega Ŝanhajo, Xingang, Qingdao, Dalian, Lianyungang, Huangpu, Zhanjiang, havenoj de Taiwan kaj aliaj de suda kaj orienta Azio, Japanio, eĉ suda Koreujo.


La ŝipo Zamenhof estas pli ol 150 m longa, 18.80 m larĝa kun supra ferdeko 12 m longa. Ĝi scipovas naĝadi kun 14 nodoj da rapideco.

Ĉar haveno Gdynia estas ĝia gepatra loko, do la esperantistoj de la urbo subtenis konstantan kontakton kun la ŝipo vizitante ĝin, kiam ĝi venadis patrolandon el malproksimaj maroj. Ili ricevadis salutojn de la ŝipo el ekzotikaj urboj, al kiuj ĝi alordiĝadis.

Tiutempe prezidis la E-Filion de PEA (Pola Esperanto-Asocio) s-ro Czeslaw Szatkowski, fervora E-aktivisto. Dank’ al liaj klopodoj aro da esperantistoj prezentis al la ŝipanaro artan programon kaj akiris amikecon de la kapitanoj, laŭvice Zbigniew Roznowski, Zbigniew Paniec, Kajetan Gazecki, Wladyslaw Pruger, Edmund Ruszkowski kaj aliaj. Esperantistoj estis ĉiam kore bonvenigataj de la ŝipo.

La radio-oficiro de la ŝipo Zamenhof — sinjoro Stanislaw Winnicki alportis al E-klubejo ĉe PTTK-o en Gdynia diversajn E-lernolibrojn ekz. el Argentino kaj Francio kaj E-revuojn el Hanojo, prelegis pri Hongkong ktp.

Sur la ŝipo flirtis flago malhisita la 13-an de februaro 1982 kaj ekspoziciita en E-muzeo ĉe la elementa lernejo nr.8 en SOPOT (meza parto de Triurbo) ĝis 1977.



La ŝipo Zamenhof surakvigita en 1959

# Poemoj el Vjetnamio

de DANG DINH DAM

## Mi alvenas Grésillon

*Jen Kultura Esperanto-Domo,  
Kastelo "Grésillon" de Baugé.  
Delonge mi legis pri Vi atente,  
Multajn E-aktivadojn tutmonde!*

*Kulturajn Kajerojn regule mi ricevis,  
Belaj aspektoj, riĉaj enhavoj ravis min  
Ke pli ol unu fojon mi revis  
Atingi tien por apreci vin.*

*Dank' al Paŭleto fruktis la espero:  
Ĉe Kunveno Pariza li promesis  
Konduki min al la fama Kastelo,  
Ĉion mi, la vjetnamo, ne forgesis!*

*Kion mi nun povus por Vi fari?  
Ĉu paroli pri la lingv' vjetnama  
Aŭ per E-poemoj vin regali,  
Tradukitaj el la koro ama?*

*Jen mi prezentu pri vojaĝo mia,  
Trimonata restado en Francio,  
Kun eventaro tiel emocia,  
Al Vjetnamio — fora land' en Azio.*

*Kun ĝojo granda mi fieras je Vi,  
Fama Kultura Esperanto-Domo!*



Dang Dinh Dam en sia Esperanto-biblioteko

*Kune kun Vi, mi semas konstante,  
Por ke l' Majstro ridetu kontente!*

## Mia vivo kaj Esperanto

*Naskiĝis mi en milita temp' kun rabio,  
Ne facile trovis por mi bon' profesia!  
Ŝvitante penis de metio al metio,  
Fine en Hanoj' Esperanton mi renkontis.*

*Ekirinte sur la verdan vojon en juli'  
de mil naŭcent sesdek kvar — feliĉe!  
Ordinara oficisto kaj sekretari'  
Tridek unu jaroj — emeritiĝe.*

*Nun mi hejme laboras por Esperanto  
Kun biblioteko, multjara kolekto.  
Miloj da Esperantaj\*, plej kara ide'  
Trezor' de l' verduloj en mia protekto!*

*Ĉu labor' de l' menso povus sen legado?  
Por verkado kaj eĉ tradukado  
Des pli valoras majstra orlibro  
La biblioteko, riĉa klerigado!*

La ŝipon alinomitan COSKO aĉetis CHINA OCEAN SHIPPING COMPANY (Ĉina Oceana Ŝip-Kompanio) en 1982.

Dum pli ol 20 jaroj la m/s Zamenhof portis varojn, interŝanĝante ankaŭ navig-morojn kaj amikecon inter diversaj landoj, popoloj kaj havenoj. Ĝiajn vojaĝ-aventurojn kaj itinerojn

priskribis s-ro Stanislaw Winnicki en unu el la plej belaj E-revuoj "El Popola Ĉinio" nr. 8/1990. La artikolo titolita "En miaj rememoroj mi ĉiam kun sento konservos Ĉinion" estis premiita en la konkurso de la redakcio. Aludas pri la ŝipo en jubilea albumo (1951-1991) la komuna ĉina-pola ŝipa entrepreno CHIPOLBROK

(nun CHINESE-POLISH JOINT STOCK SHIPPING COMPANY) okaze de ĝia 40-jariĝo.

Tamen la ŝipo Zamenhof interŝanĝadis ne nur varojn. Ĝi disvastigadis ankaŭ la lingvon Esperanto samtempe. Kaj tio estis ĝia plej granda kontribuo por la 70-jara urbo Gdynia, parto de la Triurbo ĉe la Balta Maro. ■

# Katalogo de ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto



## 1. Noveloj kaj romanoj

**BUKEDO AL VI**

1984. 96 p. 11x18 cm. Prezo: 2,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

**SPECIALA PREMIO**

1991. 120 p. 11x18 cm. Prezo: 1,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

**ORANĜA OMBRELO (mikronoveloj)**

1986. 150 p. 11x18 cm. Prezo: 2,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

**AŬTUNO EN LA PRINTEMPO**

1980. 97 p. 15x21 cm. Bind. Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

**FROSTA NOKTO**

1990. 308 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**KAMELO ŜJANGZI**

1988. 324 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**MONTARA VILAĜO**

1984. 270 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**MIRRAKONTOJ DE LIAOZHAI**

1994. 541 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 15,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**RUĜDOMA SONĜO (volumo 1)**

1995. 582 p. 15x21 cm. Ilus. Bind. Prezo: 22,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**RUĜDOMA SONĜO (volumo 2)**

1996. 793 p. 15x21 cm. Ilus. Bind. Prezo: 28,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**RUĜDOMA SONĜO (volumo 3)**

1997. 627 p. 15x21 cm. Ilus. Bind. Prezo: 26,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

## 2. Poemoj

**EL ĈINA POEZIO**

1980. 156 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**POEMOJ DE ARMAND SU**

1992. 170 p. 11x18 cm. Prezo: 3,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

**POEMOJ DE MAŬ ZEDONG**

1979. 76 p. 13,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 2,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

**222 SIMPLAJ VERSAĴOJ POR KOMENCANTOJ**

1995. 127 p. 11x18 cm. Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

**ĈINAJ KLASIKAJ POEMOJ ILUSTRITAJ**

1990. 70 p. 19x26 cm. Kolorilus. Bind. Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

## 3. Dramoj

**BRONZA TIGRO (historia dramo kvinakta)**

1985. 134 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 5,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

**QU YUAN (historia dramo kvinakta)**

1987. 120 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 3,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

**FULMOTONDRO**

1997. 135 p. 8,5x11,68 cm. Bind. Prezo: 10,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

**SUNLEVIĜO**

1997. 142 p. 8,5x11,68 cm. Bind. Prezo: 10,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

## 4. Ĉinaj popolaj rakontoj

**FELIĈA BIRDO**

1984. 56 p. 11x18 cm. Prezo: 1,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

**MAGIA ŜIPO**

1984. 76 p. 11x18 cm. Prezo: 2,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

**PAPILIA FONTO**

1984. 68 p. 11x18 cm. Prezo: 1,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

**PAŜTISTO KAJ FEINO**

1990. 76 p. 11x18 cm. Prezo: 2,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

**RATETO VOLAS EDZINIĜI**

1995. 60 p. 11x18 cm. Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

**ALFLUGINTA MONTO**

1998. 62 p. 11x18 cm. Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

## 5. Ceteraj

**ĈINA ANTOLOGIO (1919-1949)**

1986. 612 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 8,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**ĈINA ANTOLOGIO (1949-1979)**

1989. 418 p. 15,50x21,50 cm. Bind. Prezo: 8,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

**ĈINAJ MITOJ**

1992. 104 p. 11x18 cm. Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

**BRILAS SAĜO**

1987. 218 p. 12x18,50 cm. Prezo: 3,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

**ILUSTRITAJ GRAVAJ EVENTOJ EN LA VIVO DE KONFUCEO**

1998. 83 p. 26,00x18,50 cm. Prezo: 10,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

# Promeso kiel vento

Ŝi estas la unua knabino, kiun li vere amas post sia eksedziĝo. Li kredas, ke estas ne malfacile gajni ŝian koron.

Knabinoj en amo estas kredemaj. Ekz. vi povas aĉeti por ŝi trinkaĵon per la lasta monero en via poŝo; eĉ kun preskaŭ malplena poŝo vi povas diri al ŝi: "Ni pasigos mielan tempon en Italio." Malmultaj el ili kontrolos plenumadon de via promeso, kaj gravas elbuŝigi tiujn vortojn nature kaj flue.

Li opiniis, ke li havas tian talenton. Tiel de tempo al tempo li diris al ŝi: "Venontsemajne ni vizitos..." Tamen tiu knabino tre atentis liajn vortojn. Iutage ŝi plendis: "Pasintsemajne vi promesis konduki min al turisma loko, sed kial ankoraŭ ne?" Li ne atendis, ke ŝi tiel atentis liajn vortojn. Unuafoje li konsciis la gravecon de promeso. Li rememoris la tagojn travivitajn kun lia eksedzino. Ankaŭ tiam li faris multajn promesojn — ĉiutage promeni kun ŝi, semajnfine akompani ŝin en butikumado... Li hontis pro la neplenumitaj promesoj. Li sentis, ke li fariĝis trompisto. Trompisto donas malmulte kaj akiras multe en la mondo. Kaj li ja ion akiris, sed ankaŭ ion perdis, inkluzive la promesojn. Li ne gajnis la mondon por ne paroli pri revo pri reedziĝo. Li sentis, ke lia vivo estos tia.


Li ne kuraĝis rigardi ŝin rekte

en la okulojn. Li maltrankviliĝis. Post kelkaj tagoj li montris al ŝi du flugbiletojn: "Preparu vin, ni vizitu turisman lokon." Fikse rigardante la biletojn, ŝi diris: "Ne, tio estas tro luksa. Kie vi akiris tiel multe da mono?" Li evitis ŝiajn okulojn, en kiuj li vidis malĝojon. Li pruntis de siaj amikoj 3 000 juanojn kaj ne volis, ke ŝi sciu lian embarason.

"Tio estas nur turisma vizito. Mi havas monon." Li penis kaŝi sian penson. Ŝi diris: "Fakte ne gravas kien iri. Ĉar mi amas

vin, tial mi tre atentis viajn vortojn. En la vivo ofte okazas multaj neatenditaj ŝanĝiĝoj, kiuj kondukas al la malo de deziro. Mi deziras nur, ke ĉiu nia paŝo ne tre deviu." Li konscias, ke ŝi komprenas la sencon de amo pli bone ol li. Liaj promesoj fakte trompis lin mem kaj iom post iom forportis lin de feliĉo.

Fine li komprenas, ke promesoj povas esti facilaj kiel vento, tamen restos en la koro la forblovaĵo, kiu ĝenas la konscion kaj dignon eterne. ■



## ĈINIO

● La 22-24-an de majo, 1998, la Zhejiang-a E-Asocio okazigis en Hangzhou sian 4-an kongreson, kiun ĉeestis pli ol 30 esperantistoj el diversaj lokoj de la provinco. En la kongreso ili raportis sian lokan E-movadon dum la lastaj tri jaroj kaj elektis la novan konsilantaron de la asocio. Antaŭ la kunveno iuj kongresanoj disdonis propagandajn materialojn pri Esperanto al studentoj en la Ĉina Metrologia Instituto kaj respondis al ili koncernajn demandojn. Post la kunveno iuj kongresanoj vizitis la Jianggan-distriktan Palacon por Geknaboj de Hangzhou kaj ĝian amatoran radiostacion en Esperanto; kaj la aliaj ekskursis ĉe la Okcidenta Lago, tie ili kantis Esperantajn kantojn kaj propagandis nian lingvon. (Li Zhongmin)

● Zhu Minghe, membro de la Ĉina Fervojistia E-Asocio (ĈFEA), ĉeestis la 50-an Konferencon de IFEF okazintan la 16-22-an de majo en Ålborg, Danio. En la inaŭguro li donis salutvortojn en la nomo de ĈFEA kaj prelegis pri historio kaj nuna stato de ĉinaj fervojoj. (Han Daozhu)

## ĈEĤIO

● Ĉeĥa LA de IFEF en kunlaboro kun aŭstria kolegoj el AFEF aranĝis la Printempan Konferencon en la 24-26-a de aprilo 1998 en la sudĉeĥa urbeto Velesin kaj la aŭstriaj Summerau kaj Kerschbaum, sub la temo "Laŭ spuroj de la ĉevaltrakcia fervojo Budweis - Linz". 40 esperantistoj el Ĉeĥio, Aŭstrio kaj Pollando aŭskultis interesan prelegon pri la temo kaj vizitis kelkajn lok-

ojn kaj du muzeojn sur itinero de la iama unua publika ĉevaltrena fervojo en eŭropaj Budweis kaj Linz. (Jindrich Tomisek)

## GERMANIO


● Ekde marto 1997 agas grupo de esperantistoj por dokumenti la historion de la E-movado sur la teritorio de iama GDR. La tempo inter 1965 - 1991 estas sufiĉe dokumentita, mankas materialo el la jaroj 1945 - 1965. Ili ankoraŭ serĉas kaj materialon kaj kunlaborantojn! Kontakta adreso: Rolf Beau, Saxoniastrasse 35, DE-04451 Althen, Germanio. (Rolf Beau)

## HISPANIO

● Andaluzia Esperanto-Unuiĝo radiosendas ĉiusemajnan E-programon en Sevilla, Hispanio, ekde aŭgusto ĉijare. Ili petas ĉies kunlaboron. Interesitoj turnu sin al: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, p. k. 864, ES-29080 Malaga, Hispanio. (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo)

## UKRAINIO

● Esperantan movadon de Ukrainio prezentas plejparte Ukraina E-Asocio (UkrEA). En la jaro 1997 estis fondita kaj akceptita kiel landa asocio de TEJO junulara E-organizo — Ukraina Ligo de Esperanta Junularo (ULEJ). Unu el centraj Esperantaj aranĝoj, kiuj okazas ĉiujare en Ukrainio, kaj al kiuj estas invitataj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj, estas festivalo "Aroma Jalto". Loko de la festivalo estas konstanta - urbo Jalto, kiun oni opinias "perlo" de Krimeo (duoninsulo sude de Ukrainio) - natura, historioarkitektura kaj kultura centro. "Aroma Jalto '98" okazis inter la 3-a kaj la 10-a de majo 1998. La programoj konsistis el paroligaj Esperantaj kursoj, instruado de novaj Esperantaj kantoj, ekskursoj al belegaj jaltaj rimarkindaĵoj, koncertoj, konkursoj, intelektaj kaj lingvaj ludoj. Ankaŭ kadre de "Aroma Jalto" okazis UkrEA estrarkunsido kaj ULEJ-Kongreso. (Konstantin Demjanenko)



Ĉevaltrena fervojo en eŭropaj Budweis kaj Linz



# Pri ĉinaj papertondaĵoj

de LI QIANG

*En Ĉinio estis inventita papero. Do, ni estus feliĉaj, se vi ne nur sendus al ni eltondaĵojn, sed ankaŭ rakontus pri teknologio de ilia farado kaj pri diversaj stiloj de eltondaĵoj en diversaj provincoj de Ĉinio.*

M. J. HĤMELNICKIJ (Ukrainio)

**K**IEL ĉina popola artaĵo, papertondaĵoj kun historio de pli ol du mil jaroj estas vaste ŝatataj. Preskaŭ en ĉiuj lokoj de Ĉinio estas artistoj de papertondaĵoj. Same kiel aliaj ĉinaj populaj artaĵoj, ankaŭ papertondaĵoj de diversaj lokoj distingiĝas per siaj propraj stiloj kaj trajtoj. Iuj vilaĝoj, kies anoj lertas en farado de papertondaĵoj, estas konataj kiel vilaĝo de papertondaĵoj.

Papertondaĵo originis de la arto de antikva gravuraĵo, kies materialo estis metalo. Siatempe virinoj tonde faris florojn kaj birdojn el stanaj folioj kaj diverskoloraj silkoj kaj uzis ilin kiel ornamaĵojn. Poste, tiuj materialoj estis anstataŭigitaj per papero ruĝa aŭ alikolora, el kiu oni tonde faris florojn kaj figurojn de birdoj, bestoj kaj homoj. En festaj tagoj oni gluis ilin sur fenestro, lanterno kaj donaco. Menciindas, ke en la kamparo de norda Ĉinio furoras lignaj fenestroj kun kraĉoj, tapetitaj per blanka papero surhavanta papertondaĵojn ruĝajn kaj alikolorajn. Tiuj ornamaĵoj donas gajan etoson al la ĉambro. Tial, dum la Printempa Festo ĉiuj familioj gluas novajn papertondaĵojn sur la fenestroj.



Papertondaĵo de Yan'an en norda Shaanxi

Papertondaĵoj estas faritaj per tondado aŭ gravurado. Antaŭe ĉinoj faris ilin ĉefe per tondilo, ĉiufoje po 2-3 folioj. Pli delikataj papertondaĵoj estas faritaj per tondilo svelta. De la lastaj dekoj da jaroj, ili estas faritaj plejofte per gravurilo, ĉar tiu maniero pli delikatigas papertondaĵojn. Kaj per ĝi oni povas fari dekojn da ili unufoje.

Papertondaĵoj faritaj en kiu ajn loko kaj per kiu ajn instrumento, ĝenerale dirite, temas pri la popola vivo. Tiuj de norda Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco plejparte prezentas brutojn, florojn, birdojn, fiŝojn, fruktojn, legomojn, korbojn, kuvojn, kruĉojn, homfigurojn kaj aliajn. Ekz., la papertondaĵoj pri pigo kun ume-floro, paŝtisteto kun bovo k.a. faritaj de Yan'an-anoj de Shaanxi-provinco spegulas la vivon de kamparanoj en norda Ĉinio. La papertondaĵoj de Yan'an famas pro intenseco de lokaj koloroj, modesteco, krudeco kaj simpleco.

Yan'an-anoj faras papertondaĵojn nur per tondilo sen desegnoj, ĉiam kun mirinda lerteco. Loĝantoj en norda Yan'an ŝatas fari papertondaĵojn bonordaj kun linioj ne nur longaj, sed ankaŭ maldikaj kiel fadeno; tiuj en la centra — papertondaĵojn krudajn kaj modestajn kun linioj dikaj, koloroj nigra kaj blanka kaj formo vivovera; tiuj en la suda — papertondaĵojn luksajn kaj delikatajn kun linioj maldikaj kiel haro kaj punktoj malgrandaj kiel pinto de kudrilo.

Kompare kun tiuj de norda Ĉinio, la papertondaĵoj de suda Ĉinio distingiĝas per delikateco. Ekz., la papertondaĵoj de Yangzhou-anoj de Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco, kun linioj longaj kaj maldikaj, impresas per delikateco kaj eleganteco. Ili servas ne nur kiel ornamo de fenestro, lanterno, ĉapo, ŝuo kaj kapkuseno, sed ankaŭ kiel modelo por brodi imite. La papertondaĵoj de

Yangzhou temas ĉefe pri floroj versimilaj kaj variantaj laŭ sezonoj.

La gubernio Yuxian, Hebei, portas ankaŭ la nomon Hejmo de Papertondaĵoj. La tieaj papertondaĵoj plejparte estas faritaj per grifelo. Ili servas aparte kiel ornamaĵoj de fenestroj. Oni povas diri, ke ili estas reprezentantoj de la papertondaĵoj de norda Ĉinio.

La antikva vilaĝo Nanzhang situas en la gubernio Yuxian. Antaŭ 200 jaroj la vilaĝanoj ekfaris papertondaĵojn. Nun, plejparte de la familioj sin okupas pri farado de papertondaĵoj. En la vilaĝo vivas fama papertondisto Zhou He. Li estas honorita de la ŝtato per titolo de ĉina popola artisto. Liaj papertondaĵoj plejparte figuras papiliojn, pavojn, gruojn, florojn, fiŝojn kaj personojn en teatro, mito kaj legendo. Tiuj pri homfiguroj estas aparte elstaraj. Li reliefe prezentas la brovojn, okulojn, buŝon, nazon, harojn kaj ornamaĵojn de ĉapo kaj vesto de homfiguroj en siaj papertondaĵoj. La de li tonditaj pekin-operaj hom-vizaĝoj kun kap- kaj lipharoj longaj kaj maldikaj plene montras lian mirindan lertecon. La papertondaĵoj, senditaj de la redakcio de EPC al niaj legantoj en la pasintaj jaroj, prezentas vizaĝojn de personoj en la ĉina klasika romano "Tri Regno". Ili estis faritaj de Zhou He.


Por fari papertondaĵojn necesas unue stakigi dekojn da pecoj da Xuan-papero (bonkvalita papero de Ĉinio), kaj poste meti desegnaĵojn sur ilin, antaŭ ol grifeli per gravuriloj grandaj kaj malgrandaj laŭ bezono de malsamaj desegnaĵoj. Dum gravurado necesas ekzameni de tempo al tempo la randon de la gravurilo kaj tuj akriĝi ĝin, se ĝi estas difektita eĉ iomete. Alie, se ĝi rompos linion, la papertondaĵo fariĝos senutila.

Kolorigado de papertondaĵoj estas ne facila, precipe kiam oni faras simplan kolorigon. Ekz., por kolorigi papertondaĵon pri ruĝa floro oni devas kolorigi malhele ĝian centran parton, pli kaj pli hele ĝian randon, laŭ la postulo, ke la floro aspektu reliefa, sed la koloroj impresu per harmonia aranĝo. La papertondaĵoj de Yuxian karakteriziĝas per gravuro subtila, koloro ĉarma, strukturo kompleta kaj formo viveca.

Krome, en iuj lokoj oni faras papertondaĵojn per tondilo kaj gravurilo kune. Kaj oni gluas ion sur ili aparte. Tiel naskiĝas pli komplikaj papertondaĵoj. Ekz., en la gubernio Fushan, Shanxi (Ŝanŝji)-provinco, oni faras papertondaĵon pri drako el or-arĝenta papero kaj sur ĝia korpo gluas ankaŭ paperpecetojn buntajn. Dank' al tio, la drako aspektas bela en moviĝado. Krome, Foshan-anoj de Guangdong-provinco faras papertondaĵon per tondilo, gravurilo, ĉizilo, presilo kaj paŭsilo. La de ili faritaj papertondaĵoj kun belaj koloroj estas rigardataj kiel artaĵoj kun densa loka gusto.

La papertondaĵoj de Foshan estas faritaj aŭ per tondilo, aŭ per gravurilo aŭ per globetoj, kiujn oni uzas por ĉizi kuprajn lamenojn. Iuj papertondaĵoj estas faritaj per tondilo kaj gravurilo kune, per paŭso aŭ per preso. Krome, per globetoj oni ĉizas kuprajn foliojn por ricevi bildojn sur ili. Jen alispecaj papertondaĵoj, kiuj karakteriziĝas per linioj krudaj aŭ graciaj aŭ per ambaŭ. ■





Papertondaĵo de Foshan



Vizaĝo de antikva heroo en pekina opero (Papertondaĵo de Zhouhe)



Popola papertondaĵo de Hebei-provinco



Papertondaĵo de Yangzhou



# Regno de vegetaloj

**L**A monda mapo de flaŭroj vidigas vastan dezerton ambaŭflanke de la tropiko de la Kankro, tamen, Xishuangbanna de Yunnan, sudokcidenta Ĉinio, estas riĉe naturdotita regiono, kie regas humida aerfluo el la Hindia Oceano. Kun averaĝa jara temperaturo de 21-22 °C (la plej alta temperaturo estas 38-40 °C) kaj averaĝa jara pluvokvanto de 1 500-2 400 mm tie estas fama antikva tropika pluvarbaro. La loko estas honorita kiel regno de vegetaloj.

## MIRINDAĴOJ EN PRIMITIVA ARBARO

En la vasta primitiva arbaro kreskas 31 specioj da vegetaloj, kiuj vivas de cent milionoj da jaroj, sed en aliaj lokoj tiaj vegetaloj fosiliigis pro atako de glaci-riveroj en kvaternaro. Sekve, la tropika pluvarbaro estas rigardata kiel azilo de pratempaj vegetaloj.

Ĉie en la regno prosperas vegetaloj. Tie tavolo post tavolo

da vegetaloj, kiaj likeno, musko, paraŝoreo (*Parashorea chinensis*), giganto de la arbaro, kaj aliaj, konsistigas diversajn flaŭrojn. Ĉiu el ili vivas laŭ sia propra maniero. Ni prenu antikvajn lianojn kiel ekzemplon. Komence, kiam ili rampas tere, ili neniam donas branĉojn kaj foliojn por rezervi sian forton, sed, kiam ili surrampas la kronon de altaj arboj, ili do donas branĉojn kaj foliojn plej rapide kaj sendas fotosintezajon al ĉiuj partoj de la organismo, tiel ke rapide dikiĝas iliaj tigoj kaj iuj gnetoj dikas ĉ. 50 cm.

La frondaro de maljuna banjano, simila al granda ombrelo, forte sin etendas en la aero per densaj branĉoj kaj folioj. Iu banjano havas frondaron kun areo de 3 500 kvadrataj metroj kaj sub ĝia ombro mil personoj povas samtempe ripozi. Por subteni ĝin, krom la trunko, necesas ankaŭ abundo da araneaĵ-similaj aeraj radikoj, kiuj elkreskas el branĉoj. Enradikiĝinte en tero, ili rapide dikiĝas kaj, kiel la trunko, subte-

nas la gigantan frondaron. Iuj maljunaj banjanoj havas centojn da aeraj radikoj kun diametro de 20-100 cm. Grandaj platradiroj en la bazo de iuj arbotrunkoj, dikaj kiel muro kaj altaj kiel 5-6-etaĝa domo, havas radiantan aranĝon. Ĝi firme subtenas la ĉielskrapan-tajn arbojn sur kalkŝtona montodeklivo.

En la regno de vegetaloj pli ol mil specioj da arboj floras sur siaj maljunaj branĉoj kaj rizomoj. Tio adaptiĝas al la tieaj naturaj kondiĉoj. Se ili florus senescepte en sia frondaro plenplena de branĉoj kaj folioj, tio malfaciligus polenadon. Se ne, tio multe faciligas polenadon. Diversspecaj kaj belkoloraj, la orkideoj portas la alian nomon reĝo de tropikaj floroj. Iam okazas, ke vento portas etajn semojn de orkideoj sur arbojn. Tie ili ĝermas kaj kreskas. Ifoje, dekoj da specioj da buntaj orkideoj kreskas sur unu sama arbego. Rigardate de malproksime, ili aspektas kiel ĝardeneto en aero. Tamen,

ne ĉiuj parazito-vegetaloj repa-  
gas belecon al siaj vivtenantoj,  
kiel la supre menciitaj orkideoj.  
Ni prenu semojn de banjano kiel  
ekzemplon. Kiam ili, portitaj en  
interspacon inter branĉoj de  
grandaj arboj, ĝermas kaj kres-  
kas tie kiel banjanidoj, iliaj radikoj  
pli kaj pli dikiĝas kaj araneaĵiĝas.  
Ili forte alkroĉiĝas al la grandaj  
arboj, etendas siajn aerajn radiko-  
jn profunden de la tersurfaco por  
akiri nutraĵon kaj samtempe le-  
vas alten siajn branĉojn kaj folio-  
jn por akiri sunlumon. Fine ili  
sufokas siajn vivtenantojn.

El la tieaj vegetaloj desmo-  
dio (*Desmodium gyrans*) estas  
gastama. Kiam oni kantas antaŭ  
ĝi, ĝi balancas siajn delikatajn  
foliojn. Timindas ja kurarbo.  
Atakite, ĝi sekrecias venenan  
sukon mortigan.

## ORIGINO DE LA VIVO DE INDIĜENOJ

De antikve la faŭnoj kaj  
flaŭroj en la tropika pluvarbaro  
dependas unu de la alia kaj for-  
mas biosferon, en kiu originis la  
indiĝenoj. Antaŭe la Kucong-  
anoj, kiuj vivis en profundaj  
montoj kaj densaj arbaroj, ne  
scipovis teksti ŝtofon nek fari  
veston. Kiam ili ricevis bebojn,  
ili do vindis la bebojn per folio  
de pizang-arbo. Ili ne nur vivis  
de sovaĝaj bestoj kaj vegetaloj,  
sed ankaŭ nomis siajn infanojn  
per iliaj nomoj pavo, ruĝa cervo,  
kokoso, baŝoo k.a. Plenkreskinte,  
ili portas cervan aŭ bovan kor-  
non sur la brusto por montri sian  
virecon: dum la knabinoj portas  
surkape sovaĝajn florojn, aromajn  
herbojn kaj insektojn kiel orna-  
mon por montri sian belecon.

La tajoj estas antikva nacio  
en Xishuangbanna. La materialo  
kaj projekto por malgranda bam-  
bua etaĝdomo de taja familio estas  
nedisigeblaj de la naturo. En la  
regiono kreskas pli ol 100 varioj  
da bambuoj de 18 genroj. Bam-  
bua kun diametro de 30 cm estas  
uzata kiel kolonoj de etaĝdomo:

malmolaj kaj antitineaj bambuoj  
— kiel ĝia planko; dikaj ŝalmoj  
de bambuo (*Chimonobambusa  
quadrangularis*) — kiel ĝiaj te-  
goloj; kaj fleksebla bambuo —  
kiel materialo por plekti ĝian  
heĝon. En la ĉambro estas meti-  
taj bambuaj lito, seĝo kaj korbo.  
La ŝalmo de aroma bambuo es-  
tas uzata por vaporumi rizon kaj  
nodo de bambuo kun diametro de  
30 cm servas kiel sitelo.

En la primitiva arbaro pros-  
peras sovaĝaj floroj, fruktarboj,  
legomoj kaj drogherboj. Ili estas  
uzataj de la lokanoj por garantii  
la homan sanon. Gmelino (*Gmeli-  
na arborea*) estas natura aromaĵo  
por glueca kuko. Frukto de pasi-  
floro, simila al ovo kaj donanta  
ovoflavecan sukcon, estas mate-  
rialo de trinkaĵo. La frukto kun  
aromo de dekoj da fruktoj, kiaj  
banano, ananaso, liĉio, mango kaj  
frago, estas refreŝiga, nutroriĉa  
kaj efika por rezisti kontraŭ kance-  
ro. Tie estas ankaŭ mirakla fruk-  
to de sinsepalo (*Synsepalum  
dulcificum*) karmezina kaj suko-  
riĉa. Se oni gustumas ĝin duon-  
minuton kaj post tio prenas  
mirikon kaj citronon, oni sensas  
dolĉon anstataŭ acidon. Ruĝa  
suko el draka arbo es-  
tas uzata de 1 000 ja-  
roj por vigligi la san-  
gocirkulon kaj kuraci  
traŭmatismom. Arek-  
nukso utilas por pro-  
tekti la dentojn. La tajoj  
emas maĉi areknukson  
kaj pro tio havas bon-  
ajn dentojn eĉ en  
maljuneco.

## BUDHOARBO KAJ BRULLIGNA FORSTO

La belaspekta *pip-  
pal*-arbo estas honori-  
ta kiel budhoarbo de la  
tajoj, kiuj kredas je bud-  
hismo, ĉar Ŝakjamun-  
io eniris en nirvanon  
kaj budhiĝis ĝuste sub  
*pippal*-arbo. La tajoj ne

nur multe kultivas *pippal*-arbojn  
en la temploj, sed ankaŭ plantas  
unu plian *pippal*-arbidon,  
ricevinte bebon, por esti benataj  
de Budho.

La taja nacio havas longan  
historion kaj brilan kulturon. Ĝi  
havas 84 mil volumojn da sutroj.  
En la tempo sen papero oni gra-  
vuris plejparton da sutroj sur folioj  
de *pattra*-arbo por bone konservi  
ilin. La tajoj nomas sian nacian  
kulturon folia kulturo kaj kultas  
*pattra*-arbon.

La tajoj amas kaj kultas la  
naturon. Ili bone konas la rilat-  
ojn inter si kaj la tropika pluvar-  
baro. Ili neniam senkonsidere  
hakas primitivajn arbojn. Por havi  
brullignon ili kultivas ĉirkaŭ la  
vilaĝo parcelon post parcelo da  
rapide kreskantaj kasioj (*Cassia  
siame*) kaj hakas parton de ili po  
tri jaroj kiel brullignon.

Malgraŭ tio, la tiea tropika  
pluvarbaro reduktiĝas jaro post  
jaro, ĉar al iuj loĝantoj mankas  
la konscio pri protektado de la  
medio. Tion multe atentis la ĉina  
registaro kaj lokaj departemen-  
toj. Nun estas starigita tie natur-  
parko por protekti la regnon de  
vegetaloj. ■

Floro kaj frukto de pasifloro





Primitiva tropika pluvarbaro en Xishuangbanna



Aristolocio (*Aristolochia gigantea*)



Platradikoj



Arbaro formita el unu sola arbo



Platicero (*Platycerium wallichii*)



Parazito-vegetaloj sufokas sian vivtenanton.



Xishuangbanna — ĉefa loĝejo de la azia elefanto

# Iamaj senlaboriĝintoj stevardas en aviadilo

**E**N la jaro 1995, 18 senlaboriĝintoj estis dungitaj de la Ŝanhaja Aviada Kompanio kiel stevardinoj, kio fariĝis siatempe varme diskutata temo, ĉar antaŭe stevardado estis plenumata ekskluzive de belaj fraŭlinoj, sed ĉi-foje la kompanio rompis la antaŭjuĝon kaj akceptis 18 mezaĝajn virinojn kiel stevardinojn. De tiam jam pasis 3 jaroj. Ĉu ili bone plenumas sian taskon?

Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis Wu Eryu, unu el la stevardinoj.

“Mi amas mian laboron. La stevardeco tre taŭgas al mi. La laboro faras min ĝoja kaj vigla. Mi kore dankas la kompanion, ke ĝi donis al mi la ŝancon denove labori,” diris ŝi.

Antaŭe ŝi laboris en iu prestinktura fabriko de Ŝanhajo. En tiu kompare izolita medio ŝi laboris 10 jarojn. Ŝia sindonemo al laboro estis multe laŭdata de la publiko. Pro reguligo de la produkta strukturo, Wu kaj ŝiaj kamaradinoj alfrontis gravan ŝanĝiĝon en la vivo kaj post kelka tempo ŝi fariĝis stevardino.

Inter la stevardinoj Wu estas la plej aĝa, tamen ŝi modeste lernis de stevardinoj, pli junaj ol ŝi je pli ol 10 jaroj. Ŝi diligente lernis fremdan lingvon kaj aliajn sci-ojn. Tiamaniere post mallonga tempo ŝi ricevis laŭdon de la kamaradinoj pro sia afabla servado.

Foje, Wu rimarkis, ke iu maljuna pasaĝero estas zonita ĉe

la talio. Antaŭ la ekflugo Wu donis al li du lanajn tapiŝojn, konsilante, ke li subtenu la talion per ili. La maljunulo ekĝojis, demandante: “Mi estis operaciita antaŭ kelkaj tagoj. Kiel vi informiĝis pri tio?” Wu ridetis, respondante: “Via zono perfidis tion al mi, ankaŭ mia patro portis tian zonan.”

Alifoje, por ke juna geedza

kiam ŝi inspektis la kajuton. Foje ŝi rimarkis, ke maljunulino kun paralizitaj kruroj tenas en la manoj glason da trinkaĵo, montrante maltrankvilan mienon. Wu kun rideto iris al ŝi, dirante: “Estu trankvila kaj trinku! Se vi volas iri al necesejo, mi helpos vin.” Post nelonge, kiam Wu refoje preteriris la maljunulinon, ŝi rimarkis, ke ŝi volas diri ion. Wu klinis sin al ŝi kaj demandis: “Ĉu mi portu vin tien?” En la necesejo Wu helpis la maljunulinon malligi la zonan. La maljunulino kun emocio diris: “Koran dankon! Vi traktas min kiel mia propra filino.”

Wu diris, ke inspektaĵo de la kajuto multe diferencas de tiu de la tekstila laborejo, ĉar la stevardino devas labori ne nur kun atentemo, sed ankaŭ kun sincereco. Ŝi volas rekom-penci la socion per sia fervora servado al la pasaĝeroj. Ŝi stevardis en aviadilo mal-

pli ol 3 jarojn kaj ricevis entute pli ol 2 000 laŭdleterojn.

La 18 stevardinoj ja estas tre malgranda parto de la senlaboriĝintoj de Ĉinio, tamen, dank’ al ilia eminenta laboro, oni ŝanĝis sian antaŭjuĝon pri edzeco kaj aĝo en multaj postenoj, kiaj restoracio, amuzejo kaj servejo, kaj sekve de tio, multaj entreprenoj malfermis sian pordon al la spertaj, mezaĝaj, diligentaj senlaboriĝintoj. Jen multaj homoj, samkiel la mezaĝaj stevardinoj, refoje trovis sian vivovoĵon helpe de la socio. ■



Wu Eryu en servado

paro facile prenu manĝaĵojn, Wu tenis ilian 7-monatan bebon en sia sino. Ŝi rimarkis, ke la kolo de la bebo estas tre malforta. Spertoj konigis al ŝi, ke al ĝi serioze mankis kalcio. Ŝi do proponis, ke la juna paro iru al hospitalo por ke kuracisto ekzameni la bebon, kiam ili atingos Ŝanhajon, kaj plie, ŝi konigis al ili la vojon al la hospitalo. Poste la kuracisto diagnozis, ke la bebo vere suferis de grava manko de kalcio, kaj donis al ĝi ĝustatempan kuracon.

Wu ofte rimarkis ion novan,





# En Manzhouli

Teksto de SHU MEI  
Fotoj de LIU SIGONG

**E**N nordorienta Ĉinio, ĉe la landlimo de Mongolio kaj Rusio, situas la malgranda urbo Manzhouli.

En trajno veturanta al ĝi, iu junulo, kiu komercas en la urbo, laŭte diris al mi: “Bonvolu komerci en Manzhouli, se vi volas vin riĉigi. En 1991 plej viglis komerco en Manzhouli kaj per unu juano konverteblis 300 rubloj. En la lastaj jaroj la merkato estis normaligita kaj la administrado pli severa. Tamen mi komercas kiel kutime kaj bonŝanco favoros min, mi kredas.” Li ekkomerco per 300 juanoj kaj nun li posedas proksimume milionon da juanoj da kapitalo.

Veninte en la urbon, mi trovis ĝin ne tiom homoplena, kiom mi imagis. En ĝi regas kvieteco kaj komforto. Ambaŭflanke de stratoj staras ruskaj lignaj kabanjoj, loĝdomoj en la tradicia ĉina stilo kaj modernaj etaĝdomoj. En frusomera vento oni malrapide biciklis ŝultro ĉe ŝultro, mallaŭte interparolante. En la urbo ne estas aŭtobusoj kaj 800 ruĝaj taksioj multe faciligas la veturadon. Kiam mi vidis, ke rusoj kun grandaj sakoj da varoj mansignas al taksistoj, mi estis konvinkita, ke tio estas landlima urbo kun vigla komercado.

Frumatene, sur la placo antaŭ la Internacia Komerca Magazeno en antaŭurbo de Manzhouli staris multe da plezurbusoj. Rigardante foren, mi vidis, ke tiuspecaj busoj venas unu post alia el Rusio tra la landlima pasejo. Mi informiĝis, ke ĉiuj rusoj, kiuj prenas ilin por fari aĉeton en la magazeno, devas reveni sian landon samtage. Ĝuste pro tio, ili ĉiuj hastis al la magazeno. En ĝiaj du

grandaj vendejoj staras longaj vicoj da vendotabuloj kun vestoj, ŝuoj, ĉapoj, metiartaĵoj kaj ĉiutagaj necesajoj. La vendistoj parolis ruse, tamen malflue. En la magazeno preskaŭ ĉiuj varoj estis malkaraj. Mia kunvojaĝanto aĉetis paron da urso-ludiloj kontraŭ 24 juanoj. En Pekino ili kostas pli ol 40 juanojn. Iu junulo, kiu venis el suda Ĉinio, komercis en la magazeno. Li diris, ke ĉiuj varoj facile vendeblas tie pro sia malkareco kaj tiuj kun praktika valoro kaj ĉinaj trajtoj plaĉas al rusaj klientoj. Li kaj babilis kun mi kaj zorgis pri vendado. Momenton poste, li forvendis pli ol 30 servicojn da emajlitaj manĝiloj. Kiel li asertis, se la pezo de objektoj kunportebaj de rusaj klientoj ne estus limigita, do la komerco estus pli vigla. Antaŭ vendotablo de metiartaĵoj mi rimarkis, ke rusa kliento donis ĉokoladojn al vendistino kaj ĉi tiu donis al li korbbon da kukumoj. Ŝi diris kun rideto: “Tio estas amika interŝanĝo.” Ŝi esperis, ke ĉiuj ŝiaj klientoj rigardos ŝin kiel sian amikininon, kaj pro tio ŝi donis al si la rusan karesnomon Maŝa. Almontrante latison ĉe la magazeno, ŝi diris al mi: “Kiam la rusa magazeno transe estos finkonstruita, la latiso ne plu servos kaj la komerco inter ni kaj rusoj estos pli vigla.”

Nokto vualis. La zefiro karesis la kvietan kaj lumoplenan urbon. Sed tiutempe ĉiuj bufedejoj de la urbo estis plena de vicleco. Iuj rusaj komercistoj, kiuj devis resti ankoraŭ kelkajn tagojn en Manzhouli, ĝuis bongustan vinon bone konatan kaj rusan popolkanton flirtantan el malproksimo, kvazaŭ ili forgesus gastojn alilande. ■



Sur strato



Infanoj de la urbo



Ligna domo en rusa stilo





La magazzino

Açeto

Familio el Rusio



# Ŝanĝiĝo de grenovendejo

“**Ĉ**U vi manĝis?” Tio estis plej populara salutvorto en Ĉinio antaŭe. Tiam oni vizitis grenovendejon ĉiumonate por preni porciokuponon por greno aŭ aĉeti grenon.

La ĉinaj grenovendejoj estis ŝtate financitaj. De la 50-aj jaroj ĝis la komenco de la 90-aj, la urbanoj aĉetis grenon laŭ la porciokuponoj. Ili prenis porciokuponon kaj porciokuponon por greno kaj aĉetis grenon en difinita vendejo. Ĝenerale ĉiu havis 0.5 kg da greno ĉiutage, en kiu estis tritika faruno, rizo kaj maiza faruno. Dum festo oni akiris fajnan farunon kaj somere verdajn fazeolojn. Tiam oni mem preparis farunaĵon. La servo de grenovendejo estis simpla.

Tiam grenovendejoj estis nemalmultaj. Ili dissemiĝis en loĝkvartaloj. Ilia dekoracio estis simpla. Iliaj lignaj ujoj por greno estis vendotablo, kun pesilo kaj ŝovelilo. Per ŝovelilo oni prenis grenon pezan je 10 aŭ 20 kg kaj metis ĝin sur la pesilon, poste tra funelo fiksita antaŭ la vendotablo oni ŝutis ĝin en sakon de kliento. Loĝantoj ĉirkaŭ la grenovendejo de Yuquanlu diris, ke ili tiel aĉetis grenon en multaj jaroj. Tiam ĉiumonate tiu ordinara grenovendejo vendis 4 kamionojn da greno peza je 100 mil kg. Loĝantoj ofte vizitis la vendejon. En la tagoj de distribuo de porciokuponoj oni formis longan vicon.

Tamen post 1993 la grenovendejoj kvietiĝis. La porcioka-



Antaŭe grenovendejo — nun vendejo de preparitaj ĉefmanĝaĵoj

jero kaj porciokuponoj estas nuligitaj. Kvankam la ŝtato serioze limigas la prezon de greno, tamen permesas libere komerci per greno. Tial oni povas aĉeti grenon laŭvole, kaj komercistoj pri greno multiĝis. Ilia prezo de greno estas malpli alta kaj ilia greno pli bonkvalita ol tiuj de la ŝtata grenovendejo. Oni preferas aĉeti grenon ĉe tiuj komercistoj. Nun la monata vendokvanto de la grenovendejo de Yuquanlu malmultiĝis al 5 mil kg.

En tia situacio ŝtataj grenovendejoj aplikas diversajn metodojn. Nemalmultaj grenovendejoj luigis sian domon al aliaj por starigi restoracion aŭ butikon, tamen tio ne povas radikale ŝanĝi la malfacilan situacion. Poste la grenovendejo faris decidon. Ĝi pruntis monon ĉe banko kaj aĉetis maŝinon por fari farunaĵojn. Ĝi fariĝis farejo de farunaĵoj.

Laŭ statistiko, nun en Ĉinio la kvanto de farunaĵoj konsumataj de urbanoj estas trione kiom la

postulata grenokvanto. En multaj grandaj kaj mezgrandaj urboj oni aĉetas ĉefe farunaĵojn anstataŭ mem prepari ilin por ŝpari tempon.

Nun en la ekstera ĉambro de la grenovendejo de Yuquanlu oni vendas grenon, en la meza loĝantoj povas mem elekti farunaĵojn, kaj la interna ĉambro estas kuirejo. Ĝiaj laborantoj estis trejnitaj, kaj ili ĉiuj kapablas fari dekojn da specoj da farunaĵoj. Ĉiutage ili aĉetas farĉon ĉe aliaj vendejoj kaj faras diversajn farĉitajn farunaĵojn. Kvankam la prezo de la farunaĵoj estas iom pli alta, tamen ili estas bonvenaj. Oni diras, ke la prezo de privata vendejo estas malpli alta, tamen la pezo ofte ne sufiĉas kaj higienaj kondiĉoj estas malpli bonaj. La frekventantaj klientoj estas proksimaj loĝantoj. Ili ofte vicitendas en la grenovendejo de Yuquanlu por aĉeti farunaĵojn, kiuj freŝas kiel tiuj vaporumitaj de ili mem. ■



# Cizhou-bakujjo ĥodiaŭ

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

La nomita bakujo situas en la antaŭurbo de Handan, Hebei-provinco. Jam en la antikveco ĝiaj porcelanaĵoj kun bluj desegnoj estis tre famaj pro sia delikateco.

Por fari tiajn porcelanaĵojn oni faris diversajn desegnojn sur la blanka fono, kun kobalta oksido kiel kolorilo. Tiaj porcelanaĵoj estis ĉiam ŝatataj kaj rigardataj kiel trezoro.

Laŭ esplorado, en la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911) tiaj porcelanaĵoj estis grandkvante produktitaj kaj eksportitaj. Marnavigisto Zheng He (1371-1435) kunportis grandan kvanton da tiaj porcelanaĵoj, kiam li navigis al malproksimaj landoj.

En la lastaj jaroj la en-kaj eksterlandaj merkatoj bezonas pli kaj pli multe da tiaj porcelanaĵoj, kies produktado tamen estis katenata




Bakujjo pli ol 400-jara


de la desegno kaj kies produktokvanto restis ne granda.

Dank' al la serioza studo pri la tradicia arto de tiaj porcelanaĵoj, esploro pri iliaj sciencaj principoj kaj ripetada eksperimentado, la teknikistoj de Handan ekkonis teknologiojn por grandkvante produkti tiajn porcelanaĵojn en norda Ĉinio kaj sukcese fabrikis delikatajn porcelanaĵojn de novaj specoj.

Nun Cizhou-bakujjo jam fariĝis unu el la 7 grandaj porcelanaj produktoj de Ĉinio kaj ĝi produktas cent specojn da porcelanaĵoj, inkl. de la ĉiutage uzataj porcelanaĵoj kaj tiuj por konstrua kaj industria uzoj. Iliaj produktoj havas grandan debiton.



Imitado de antikvaĵo




Pentrado







Serioza kontrolo



Algluado de desegno



En bakejo



Ronda domaro

# Mirindaj

Fotoj de HAN HONG

En alta montaro de Yongding-gubernio, Fujian-provinco, sudorienta Ĉinio, estas miloj da antikvaj konstruaĵoj kvadrataj, rondaj kaj ovalaj el tero, kalko, sablo kaj gruzoj kun ligna aŭ bambua skeleto. Oni nomas ilin terdomoj. Tiuj imponaj konstruaĵoj estas altaj, dikaj kaj krudaj.

La historio de tiuj konstruaĵoj estas longa. Antaŭ kelkaj jarcentoj, por eviti militan haoson, la enmigrintoj el centraj regionoj de Ĉinio ekloĝis tie kaj post pluraj generacioj tie formiĝis apartaj montvilaĝaj kons-




Kunvenejo



La plej granda terdomo Zhencheng





Terdomo Rusheng kun plej malgranda diametro




Kvadrata terdomo Taoju simila al palaco


# terdomoj

truajoj — terdomoj. El ili la rondaj estas aparte mirindaj. Ĉiu el la antikvaj rondaj domoj enhavas multajn malgrandajn domojn kun centoj da ĉambroj, loĝatajn de centoj da homoj. Tie estas haloj, tenejoj, putoj, dormejoj k.a. La domoj estas civilaj, tamen kun fortika strukturo interne. Ili estas bone prilumataj kaj ventolataj kaj povas reguligi temperaturon kaj rezisti kontraŭ tertremo.

Tiuj konstruaĵoj altiris al si multajn fakulojn ĉinajn kaj eksterlandajn. Oni opinias, ke ili estas mitaj montaj konstruaĵoj.



lom da ĉielo videbla inter la terdomoj



La teretaĝo servas kiel kuirejo.



Familio en la terdomo

# En la urbo Jiande

**L**A urbo Jiande sidas en la centro de la turisma itinero Hangzhou — Huangshan kaj preter ĝi fluas Xin'an-rivero. Ĝiaj ĉarmaj pejzaĝoj kaj popolaj moroj donis al mi profundan impreson.


Oni malkovris en Jiande kojnodentajn fosiliojn de saĝo-homoj vivantaj en la malfrua plejstoceno antaŭ pli ol 50 mil jaroj. La Ĉina Akademio de Sciencoj nomas saĝo-homojn Jiande-homoj. Tio estas unika spuro de prahomoj eltrovita en Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco, pro kio

oni povas diri, ke Jiande estas historia fonto de Zhejiang.

Transpasinte verdajn oranĝarbaron kaj teĝardenon, ni grimpis sur la monton Daci en la antaŭurbo de Jiande, sur ĝia ĉefpinto imponas budhostatuo 147 m alta, la plej granda stara budhostatuo de Ĉinio. Sur altaj krutaĵoj ĉirkaŭ ĝi majestas budhismaj temploj interligitaj per koridoro. Ili portas la nomon Pendantaj Temploj de Suda Ĉinio. Marŝante en la koridoro, mi ĝuis la ĉarmon de verdaj montoj kaj lagoj ekstere, kvazaŭ mi promenus en la aero.

En la templo de Ksitigarbha en la monto Daci staras busto de Bodisatvo Ksitigarbha.

Jiande havas multajn popolajn morojn. Laŭdire, la fiŝistoj, kun la familiaj nomoj Chen, Qian, Li, Lin, Yuan, Sun, Ye, Xu kaj He, vivantaj de fiŝkaptado sur Xin'an-rivero, estas posteuloj de malamikoj de Zhu Yuanzhang, la unua imperiestro de Ming-dinastio (1368-1644). Pro tio, ili estis permesataj vivi nur de fiŝkaptado kaj geedziĝi inter si. Kun tempopaso iliaj moroj diferencis  
*(Daŭrigo sur p. 37)*



Geedziĝa ceremonio surakva en Jiande

# Ĉinaj rusoj

de LIU XIAOCHUN

**E**N Yining, Xinjiang, iam estis ortodoksa preĝejo en greka arkitektura stilo. Matene kaj vespere ĝia belsona tintado faris la urbon aparte majesta.

Yining estas rigardata kiel religia centro de la ĉinaj rusoj en Xinjiang. Tie vivas ĉ. 3 000 rusoj, kiuj konsistigas pli ol duonon de tiuj en Xinjiang. Ĉinio havas ĉ. 13 500 rusojn, kiuj vivas ĉefe en Xinjiang, Interna Mongolio, Heilongjiang kaj 5-6 grandaj urboj.

La prapatroj de tiuj rusoj transloĝiĝis en Ĉinion pro milito aŭ geedziĝo. Ilia historio en Ĉinio jam havas 70-700 jarojn.

## NACIO FORMITA EL ĈINOJ KAJ RUSOJ

La ĉinaj rusoj plejparte havas ne nur sangrilaton kun blankuloj, sed ankaŭ trajtojn de flavuloj. Dum longa tempo ili miksoĝis kaj geedziĝis kun hanoj, kazahoj kaj uĝuroj. Oni faris analizon de la konsisto de la kromosomo X ĉe komuna bebo de hano kaj rusino kaj trovis, ke ĝi estas diferenca kaj de la tradiciaj trajtoj de sia rusa patrino kaj de tiuj de sia hana patro. Tiaj homoj estas belaj, firmvolaj, sagacaj, kuraĝaj, kreivaj kaj frosto-eltenemaj. Longe influate de la ĉina kulturo, ili multe ŝanĝiĝis en aspekto, staturo, ideologio, moroj, kutimoj kaj produktaj manieroj. Jen iom post

iom formiĝis rusa nacio kun ĉinaj karakterizaĵoj.

La ĉinaj rusoj plejparte uzas han-lingvon. Kun siaj familianoj kaj samnacionoj ili parolas ankaŭ la rusan lingvon. Ili plejparte havas nomojn ne nur ĉinan sed ankaŭ rusan.

La rusoj de antikve amas la glacian mondon kaj eble ĝuste pro tio en iliaj okuloj blanko estas simbolo de pureco kaj nobleco. La rusaj viroj havas kvaliton de ĝentlemano. Ili ĉiam ĝentile traktas virinojn kaj eĉ en heredo cedas al ili.

La ĉinaj rusoj ĉiam loĝas en la fekunda kaj herboriĉa loko. Knabinoj ŝatas planti florojn ĉe sia domo somere por beligi la medion. Ili konstruas lignan domon en vasta korto ĉirkaŭita de adobaj muroj. En la antaŭa korto ili kulturas legomojn kaj florojn kaj en la malantaŭa bredas brutojn. En iliaj kortoj estas ankaŭ tenejo kaj kelo kun brando, biero kaj peklitaj legomoj. Ili tre amas la vivon, kiu siavice rekompenas ilin per idilia komforto.

Tio rememorigas pri la eŭropa komforto. Kompreneble Kristnasko kaj Pasko ambaŭ estas gravaj por la ĉinaj rusoj, kio tamen ne malhelpas ilin soleni la tradiciajn ĉinajn festojn, kiaj la Printempa Festo kaj Aŭtunmeza Festo. El iliaj manĝaĵoj iuj havas rusan guston kaj aliaj tiun de hanoj kaj aliaj ĉinaj nacioj. La ĉinaj rusoj

manĝas panon mem bakitan, rusajn pladojn, supojn kaj peklitajn legomojn. Ili manĝas ankaŭ ĝjaŭzi-ojn, rizon, vermiĉelojn, uĝurgustan rizon kaj mongolan stufitan ŝafaĵon.

Nun la religia vivo de junaj rusoj ne estas tiel rigora kiel tiu de iliaj gepatroj, tamen ili plejparte kredas je ortodoksismo. Kvankam la ortodoksa preĝejo en Yining estis detruita en la haoso antaŭ 30 jaroj, tamen en multaj urboj aperis pli da novaj preĝejoj. Krom la kutima religia aktivado, en preĝejoj oni ankaŭ okazigas geedziĝan ceremonion kaj faras bapton al beboj.

Kompreneble, ankaŭ la ĉinaj rusoj havas sian apartan moron, ekz. ĉe la tablo estas malpermesite paroli pri azeno kaj hundo. "Unu alumeto ne bruligu cigaredon por tri homoj". Kvankam multaj fumantoj en Ĉinio konas tiun proverbon, tamen nur malmultaj scias, ke ĝi devenis de rusoj.

## PRODUKTA AKTIVADO


Jam de antikve la rusoj estas geniaj en studo de sciencoj kaj tekniko kaj precipe en ekspluato de petrolo, riparo de aŭtoj, progresigo de agrikulturaj teknikoj, plibonigo de frukto-varioj kaj kuraco de bestoj.

Bredi abelojn estas grava okupo de ĉinaj rusoj. Oni diras, ke la rusaj abel-bredistoj plejparte estas meteorologoj kaj aŭguristoj. Ĝenerale ili vivas 5 monatojn surkampe ĉiujare kaj kun ŝanĝiĝo de florkulturejoj translokas la abelkestojn. Ĝenerale, ĉiu bredisto prizorgas 30-50 kestojn. Ankaŭ bredistoj transloĝiĝas kune kun la abelkesto. Fine de aŭtuno kaj komence de vintro ili devas prizorgi la abelojn por sekura vintrado, tiam ili devas teni la temperaturon de la kesto je 6-12°C kaj fari la lokon konvene ventolata kaj prilumata.

Krom tio, ili ankaŭ faras hi-

bridigon de malsamrasaj abeloj por plibonigi la abelajn rasojn, preventi kaj kuraci iliajn malsanojn per sciencaj metodoj.

Estas menciinde, ke en la lastaj jaroj en la ekonomia reformado kaj konstruado kaj precipe en pordomalfermo kaj enkonduko de eksterlandaj kapitaloj la rusoj ludis apartan rolon, ĉar Ĉinio kaj Rusio havas longan komunan landlimon, kiu multe faciligas komercadon inter la du landoj, kaj plie, la rusoj de ambaŭ landoj facile komprenas unu la alian kaj havas similajn morojn. Ekz. la urbo Ergune en Interna Mongolio staras ĉe la rivero Ergune kaj okcidente kaj nordokcidente de ĝi tuj trans la rivero estas teritorio de Rusio. Etendiĝas landlima linio 667 km longa. En la tuta urbo vivas 4 948 rusoj, kaj multaj el ili havas parencojn en Rusio kaj ofte korespondas kun ili. Tio estas tre favora al la landlima komerco de la du landoj. ■



Ligna domo en tradicia rusa stilo

(Daŭrigo de p. 35)

de tiuj de aliaj loĝantoj en Jiande kaj ilia geedziĝa ceremonio sur rivero distingiĝis per siaj propraj trajtoj. En la regperiodo de imperiestro Kangxi (1662-1723 sur trono) de Qing-dinastio (1644-1911), ili ekhavis la rajton loĝi sur tero. Poste, malaperis tia ceremonio. En la lastaj jaroj, dank' al la turisma disvolviĝo en la loko, laborantoj de la turisma departemento de Jiande reaperigis la moron laŭ historiaj notoj kaj rakontado de maljunaj fiŝistoj kaj prenis ĝin kiel turisman programeron. En la tago post kiam ni atingis la urbon, ni spektis la prezentadon de geedziĝa ceremonio sur rivero. La boatoj kun akompanantoj kaj bonvenigantoj de la novedzino estis ornamitaj kiel buntaj palankenoj. La novedzino kun ruĝa vualo surkape forlasis sian boaton kaj sidiĝis en ruĝa ligna kuvego. Tiam iu mal-

junulino manĝigis ŝin, admonante, ke ŝi amu sian edzon, respektu siajn bogepatrojn ktp. Poste, kvar fortaj viroj de la flanko de la novedzino levis la kuvon, trifoje turnis ĝin ĉeloke kaj ĵetis ĝin kune kun la novedzino al la kvar fortaj bonvenigantaj viroj de la flanko de la novedzo sur la boato. Kaptinte la kuvon kun la novedzino, ankaŭ ili trifoje turnis ĝin ĉeloke. Post tio, la novgeedzoj klinsalutis la ĉielon, la teron, la gepatrojn, parencojn kaj amikojn. Fine, ili eniris en sian ĉambron.

La Jiande-a Hidroelektrejo ĉe Xin'an-rivero, la unua hidroelektrejo projektita kaj konstruita de Ĉinio mem, estas unu el la plej gravaj ekonomiaj sukcesoj de Ĉinio en la 50-aj jaroj. Pro konstruo de baraĵo sur la rivero formiĝis en ĝia supra parto giganta artefarita lago, en kiu kuŝas 1 078 malgrandaj insuloj. Do,

ĝi nomiĝas Lago de Mil Insuloj.

La nomita lago, Arbara Ĝardeno Xin'anĵiang kaj Jiande-a Hidroelektrejo ĉe Xin'an-rivero formas turisman pitoreskejon. Iuj insuloj en la lago estas nomataj per nomoj de bestoj, ekz., Insulo de Serpento, Insulo de Cervo kaj Insulo de Simio. Diversaj sovaĝaj bestoj libere vivas sur la insuloj. Ŝipante sur la lago kun akvo klara, mi vidis foje refoje trutojn naĝi preter nia ŝipo. Lokanoj diris, ke la akva kvalito ĉiam estas plej bona laŭ normoj difinitaj de la ŝtata mediprotekta departemento. Nun mi ankoraŭ remaĉas la ĝuadon de graso fiŝo ĵus kaptita en la lago kaj biero kun marko Xin'anĵiang kaj la popolkanto de Jiande ofte resonas ĉe miaj oreloj. ■

\* La aŭtorino el Japanio laboras en la redakcio de la japanlingva revuo "Popola Ĉinio".

# Aromo de virinoj

de YIN QIN

*“Aromo de virinoj” estas titolo de usona filmo, ankaŭ travivaĵo por multaj. En Ĉinio, virinoj, precipe la junaj ne rifuzas ŝminkon nek parfumon. Ili ŝatas beligi sin mem. Do kiel ili sin beligas? Leginte la artikolon de Yin Qin, eble vi sentas, ke pri belaj knabinoj vi scias pli multe.*

Yu Tao

**E**N vendejo la knabinoj preferas rigardi vestojn kaj ŝminkojn. Ĝenerale en la unua etaĝo estas vendotabloj de ŝminkoj. Tie krom abundo da beligaĵoj estas allogaj ankaŭ reklamoj kaj aranĝo de vendotabloj. Ifoje ankaŭ la knabinoj ne scias, kion ili preferas?

## ELEKTI TAŬGAN ŜMINKON

En 1987, kiam mi ekvizitis universitaton, mi ricevis sakon de ŝminkaĵoj donacitan de mia fratino, inter kiuj estas okul-ombrumo nigra kaj blua. Mia fratino diris ke mia haŭto estas bruna, do la nigra pli taŭgas por mi. Antaŭ kelkaj tagoj mi refoje rigardis miajn malnovajn fotojn kaj rimarkis, ke mi faris miajn okulorbitojn kiel tiujn de pando.

Poste, mi eksciis, ke ne ĉiu ŝminko taŭgas por mi. Tamen tiam en Ĉinio ne estis tiom da specoj de ŝminko, oni uzis nur simplan haŭtoprotektan kremon. Poste pli kaj pli multe da ŝminkoj aperis, kaj multiĝis miaj kolegoj, kiuj bone konas ŝminkojn. Kaj ŝminkado fariĝis nia konstanta temo de interparolo. Tiamaniere mi ricevis multe da scioj pri ŝminkado.

Krome, mi ofte rigardas reklamojn en TV. Ĉisomere, de TV mi informiĝis pri kremo kontraŭ sunradioj. Mi provis ĝin kaj kontentiĝis, ĉar la kremo ne nur humidigas haŭton, sed ankaŭ ĝin protektas kontraŭ ultraviolaj radioj. Kompreneble iam mi estis miskondukita de reklamo. Foje altirite de reklamo, mi aĉetis kremon, kiu tamen faris mian vizaĝon alergia.

Nun en multaj magazenoj estas ofertistoj de ŝminkoj, kiuj helpas vin en elektado. Eĉ se vi scias nenion pri ŝminko, estu trankvila. Ĉar se vi haltas antaŭ iu ajn vendotablo, oni tuj fervore ofertas sian produkton al vi. Iuj ŝmiras la kosmetikon sur via mandorso, aliaj rekte sur via vizaĝo. Tiuj servoj ŝajne estas senpagaj. Tamen se mi volas nenion aĉeti, mi do evitas tiujn servojn.

Ĝenerale dirite, modaj virinoj estas malavaraj je ŝminko. Tamen salajruloj, kia mi, devas atenti la prezon. La prezo de diversaj ŝminkoj estas diferencaj. La importitaj multekostas, tial kosmetikaĵoj faritaj en fabrikoj investitaj de Ĉinio kaj eksterlando kune tre plaĉas al multaj virinoj.

## ESTU ETERNE JUNA

Kvankam oni povas trovi taŭgan ŝminkon, tamen ili estas klaraj, ke la ŝminkoj estas destinitaj nur por kovri malbelaĵon. Tial en la lastaj jaroj, oni alte taksas flegon de haŭto kaj laŭeble protektas ĝin kontraŭ maljuniĝo. Antaŭ kelkaj jaroj, se sur la vizaĝo de iu knabino aperis aknoj, ŝi eble kovris ilin per ŝminko, tamen nun ŝi tion ne faras kaj vizitas beligejon.

Antaŭ kelkaj jaroj ankaŭ mi vizitis beligejon, kvankam la tiea beligo estas utila, tamen tre pagiga, temporaba.

Iuj el miaj amikinoj bone scias pri beligo kaj flegado de haŭto. Ili uzas ŝminkojn kun difinitaj markoj, vizitas difinitan beligejon kaj turnas sin

al difinita beligisto. Iam ili rigardas nutraĵojn utilaj por reguligi endokrinon kaj beligi haŭton. Por tio ili multe pagas.

Influante de mia amikino Xiao Li, mi faras haŭtomasaĝon en hejmo. Ŝi kovras haŭton per ovoblanko, lakto kaj kukumo. Ŝi nomas ilin naturaj beligaĵoj. Ŝi diris, ke kvankam ili ne povas vere ŝanĝi la haŭton, tamen almenaŭ ne malhelpas.

## DECE ŜMINKI

Ĉinaj virinoj estas diskretaj. Ili esperas, ke ilia ŝminkado ne estos okulfrapa. Servistinoj pli dense ŝminkas kaj ni, oficistinoj, maldense ŝminkas. Ĉar en kabineto oni sidas proksime, kaj densa ŝminkado impresas ne tiel bone.

Se ni partoprenas balon, ni preferas dense ŝminki, en flagrantaj lumoj, kun densa ŝminko virinoj aspektas pli bele. Por geedziĝo, novedzinoj vizitas beligejon.

Iam sur strato renkontiĝas knabinoj bizare ornamitaj. Kun buntaj haroj kaj arĝentaj lipoj en kontaktlensoj konformaj al la haroj en la koloro, ili aspektas "cool" (malvarme). Kvankam tio ne plaĉas al multaj, tamen ili mem tion ne atentis. ■

## Ĉe vendotablo de ŝminkoj



**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Xu Shuohua, 12-j. memlernanto, volas kor. Esperante, angle, ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, angla lingvo, pentrado, kaligrafio, poezio, skulpturo, filatelo, ŝako, literaturo, *uŝu-o*, komputero kaj muziko. Xu Shuohua / (Xu Zhaochang), 3-402, Yixing Li, Hongde Jie, Haizhu Qu, CN-510235 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

\*Membroj de E-grupo en Jiaying-universitato dez. kor. tm. Skribu al: Chen Senjie, 9604, Zhongwen Xi, Jiaying Daxue, CN-514015 Meizhou, Guangdong, Ĉinio.

\*S-ro S. Jansanĝav dez. kor. tm., interesiĝas pri sennacieco. Adr.: P.O. 21/797, Ulan Bator, Mongolio.

\*S-ro J. K. Hammer dez. kor. tm., interesiĝas pri skoltismo. Adr.: Taxusstraat 7, NL-1505 AA Zaadam, Nederlando.

\*S-ro Shree Prashad Shrestha dez. kor. pri turismo. Adr.: 5/1 Basantpur, Kathmandu, Nepalo.

## Enigma

Farmisto ĉiam diras al turistoj: "Mi nun montros al vi mondsensacion. Jen, en la malantaŭa parto de la bovostalo estas bovino. Je ĝia mammo mi ĉiam povas konstati la precizan horon, ĉu vi kredas?" Li eniras en la stalon, genuiĝas antaŭ la bovino, iomete levas ĝian mamon permane kaj diras precize, kioma horo nun estas.

Do, la demando: Kiamaniere tio estas ebla?

**Felix Baumgart** (Germanio)  
(Solvo trovebla en tiu ĉi numero)

# Ĉinoj ŝatas kolektadon

**Ĉ**E la tagiĝo emerito Li Zhongqin direktis sin al bazaro de antikvaĵoj en antaŭurbo. Tiam en la bazaro jam svarmis homoj. Post nelonge Li trovis sian preferaĵon. Tio ja estis paro da virinaj ŝuoj de malgranda mezuro. En la malnova Ĉinio la virinoj firme vindis siajn piedojn jam de la infaneco. Portante tiel malgrandajn ŝuojn, la ĉinaj virinoj suferis multe. La ŝuoj estas tiel malgrandaj, ke neniu el la hodiaŭaj virinoj povas enmeti siajn piedojn en ilin. Li diris, ke li estas interesata de tiaj ŝuoj, ĉar ili montras la malfeliĉan pasintecon de la ĉinaj virinoj kaj plie la ŝuoj estas delikate faritaj. Montrante paron da ŝuoj, li diris, ke tio estas ŝuoj por novedzinoj. Sur la ruĝaj atlasaj ŝudorsoj vidiĝas belaj fenikso kaj peonioj. Li jam kolektis pli ol cent parojn da tiaj ŝuoj.

La klientoj de tiu bazaro plejparte estas ordinaraj homoj, kia Li Zhongqin. Ili kutime serĉis ŝatatajn objektojn kune kun aliaj klientoj, kiaj diplomatoj kaj riĉaj komercistoj. Kolektado jam ne estas afero ekskluzive de altranguloj kaj riĉuloj. Laŭ nekompleta statistiko, en Ĉinio estas dekoj da milionoj da amatoroj.

La amatora rondo opinias, ke ĉio povas esti kolektata. Oni kolektas glumarkojn, poŝtmarkojn, insignojn, antikvajn monerojn, biletojn, invitilojn, porciokuponojn por greno, telefonkartojn k.a. Oni diris, ke en Ĉi-

nio estas pli ol 2 000 specoj de kolektitaj objektoj. Multaj kolektas antikvaĵojn, pentraĵojn, kaligrafaĵojn kaj meblojn, sed iuj ŝatas groteskajn, kuriozajn kaj rarajn objektojn. Iuj el ili estis tute ne spertaj, sed post pluraj jaroj ili havas abundon da konservaĵoj kaj fariĝis sperta amato. S-ro Duan kolektis diversajn enirajn biletojn 20 jarojn. En ferioj li iris al parkoj, muzeoj kaj aliaj turismaj lokoj en Pekino kaj poste veturis ankaŭ al aliaj lokoj de Ĉinio. Iom post iom li spertiĝis kaj

kolektado fariĝis nemankigebla parto de lia postlabora vivo. Nun li havas pli ol dek milojn da eniraj biletoj. En kolektado li amikiĝis kun multaj. Oni diris, ke liaj konservaĵoj estas ege valoraj. Koncerne sian diletantecon, li diris: "Sen bonordigo la kolektantoj estas simplaj aĉetistoj, kaj sen studo nur konservantoj." Tiuj vortoj estas famaj en la amatora rondo. Ankaŭ multaj aliaj komen-



Kolektanto de horloĝoj

cis kolektadon, ekkonis la signifon, akiris iajn sciojn kaj ekŝatis la aferon. Tiamaniere ili iom post iom fariĝis spertaj, aŭtoritataj. Montrante siajn objektojn, ili povas lerte konigi iliajn trajtojn.

Nun la furora kolektado en Ĉinio vekas verŝajne ne nur la personan intereson kaj spiritan aspiron, sed ankaŭ investon. Ĉiflanke aŭkcio multe ekscitas kolektadon. Aŭtune de 1995, 4



kompanioj de antikvaĵ-aŭkcio, nove fonditaj en Pekino, en duonmonato okazigis 13 aŭkciajn kunvenojn, kie iuj objektoj longe konservitaj vendiĝis je kontentiga prezo, iuj el la prezoj eĉ superis tiujn en evoluintaj landoj. La aktivado pelas homojn elspezi por kolektado, sekve de tio tiu kultura fenomeno ekportis iom da spekula koloro.

Fakuloj atentigas la investantojn de kolektado, ke estas granda risiko por tiuj, kiuj faras kolektadon por profito, kaj ĉi-flanke la risiko ne estas malpli granda ol tiu en akiado. Ja estas multaj homoj, kiuj malprofitis de kolektado de antikvaĵoj. Iu kamparano informiĝis, ke alilandanoj ŝatas *doŭ-on*, antikvan ĉinan volumenon mezurilon por greno, kies volumeno egalas ĉ. 10 litrojn, kaj multe klopodis kaj fine aĉetis dekojn da *doŭ-oj*. Pro profitemo li poluris ĉiujn malnovajn *doŭ-ojn*, sed vendis neniun el ili. Estis ankaŭ kolektanto de porcelanaĵoj. Foje li vendis porcelanan bovlon kontraŭ 800 juanoj. Pro tio li estis ekster si de ĝojo, sed li tuj sentis grandan bedaŭron, aŭdinte, ke tiu bovlo kostas 250 000 juanojn post ekspertizado de fakuloj. Nun multaj amatoroj scias, ke nur kun multaj fakaj scioj oni povas distingi la verajn disde la falsaj kaj ne malŝpari tempon nek monon. Iu kolektanto de pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj konigis siajn spertojn de kolektado: legi multajn eldonaĵojn, inkl. de bildgazetoj, fakaj revuoj kaj libroj pri belarta historio, ofte viziti muzeojn, galeriojn, belartajn domojn, vendejojn de pentraĵoj, diversajn ekspoziciojn, amikiĝi kun fakuloj kaj lertaj aprecantoj por akiri sciojn. Malgraŭ ke iuj nun multe elspezas por kolektado, fakuloj maltrankvilas: kolektado estas kultura afero; se oni klopodas en tiu kampo ekskluzive por profito, do kolektado devios de la ĝusta vojo. ■

## E-filatelaĵoj por kolektantoj

Koverta (tutaĵo) kun surprisita poŝtmarko kaj koncerna stampo, dediĉita al la 71-a UK. Prezo: 2.00 USD.



Koverta kun poŝtmarko pri la centjara jubileo de Esperanto kaj koncerna stampo. Prezo: 1.00 USD.

Poŝtmarko pri la centjara jubileo de Esperanto. Prezo: 2.00 USD po-kvarope.

Tiujn filatelaĵojn oficiale eldonis la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio.

La prezoj inkluzivas sendokoston.

Mendu ĉe: Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio", P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio



## Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero

Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:

Importo kaj eksporto de komercaĵoj;

Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606

Hejmpaĝo: <http://www.online.ah.cn/pac/>


Ret-poŝto: [cnhflib@public.hf.ah.cn](mailto:cnhflib@public.hf.ah.cn)

## Solvo de la enigmo

En la malantaŭa parto de la bovostalo estas trueto en la muro. Kiam la farmisto iomete levas la mamon de la bovino, li povas rekoni bone la horloĝon sur la turo de la preĝejo.

# Elstara dancistino

Teksto kaj fotoj de WANG YAO




Ŝia edzo multe helpas en kuirado.

Chen Ailian estas fama ĉina dancistino. 12-jara, ŝi komencis lerni dancadon kaj, 20-jara, ŝi gajnis kvar medalojn en internacia danca konkurso. En 1985 ŝi forlasis la Ĉinan Operan kaj Dancan Teatron kaj iniciatis la Artan Trupon Chen Ailian. En 1995 ŝi fondis la Dancartan Lernejon Chen Ailian depende de la Pekina Arta Kolegio. Dum dekoj da jaroj ŝi rigardis dancarton kiel sian vivon kaj senĉese serĉis la sukcon de la arto.


Por elkulturi elstarajn dancistinojn ŝi transloĝiĝis en la dancartan lernejon en la antaŭurbo de Pekino. Frumatene ŝi komencis sin ekzerci kune kun siaj lernantoj dekelkjaraj. Dank' al ŝia persista ekzercado ŝia korpo posedas mirindan flekseblecon kaj ŝi dancas bele kiel antaŭe.

Ŝi diris: "La homa vivo similas al la kvar sezonoj. Ĉiu sezono havas sian propran koloron kaj utilecon, kaj plej gravas, ĉu oni povas firme teni ĝin aŭ ne."



Provludo de baletto "Ruĝdoma Songô"





Inter knabinoj



“Dancista Sanktejo”

Paŭzo

# Rakonto pri ŝakludo en la oficejo

**L**ONDON, Markizo tre frue venis al sia oficejo. Laŭ kutimo, infuzinte teon li sidiĝis, pensante pri la laboro.

“Hodiaŭ mi nepre venkos lin,” lia pensfadeno sin turnis al ŝakludo kun Duko. Markizo kaj Duko estas moknomoj de du oficistoj, kiuj ĉiutagmeze ludas ĉinan ŝakon. La pasintan vendredon, Duko venkis Markizon per 5:0, kio eĉ nun ankoraŭ maltrankviligis Markizon. Tiutage dum la meza stadio Duko multfoje “fosis enfalulojn”, kaj Markizo foje-refoje estis trompita — lia ĉaro estis kaptita, lia ĉevalo venis al tre malbona loko, li dronis en malfaciloj. “Mi ne bone ludis en la komenca stadio,” tiel pensante li rigardis dimanĉe televidan programon pri konkurso de ĉina ŝako. La ŝakmajstro klarigis artifikon en la komenca stadio, kiun li ofte faris. La majstro diris, ke ĉe la 7-a paŝo oni nepre movu la soldaton sur la 3-a vertikala linio, por ke la ĉevalo havu vojon eliri. Tamen Markizo kutimas movi gvardianon. Li alte taksas la rolon de gvardiano. Por kapti la kontraŭan gvardianon, li ofte perdis sian kanonon. Nun en lian kapon venis sugesto de la majstro. “Je la 7-a paŝo mi faros novan movon.” Li ekhavis memfidon.

En la moderna mondo ĉiutage aperas novaj amuzoj, kiaj elektronikaj bestetoj kaj komputeraĵoj. Tamen ĉina ŝako daŭre okupas la unuan lokon en la ludoj ŝatataj de ĉinoj, ĉu intelektuloj ĉu kamparanoj. Kiel en urboj, tiel ankaŭ en vilaĝoj, ĉie videblas ŝakludantoj. Ĉiusemajne la televida programo prezentas ŝak-konkurson. La infanoj ne bezonas viziti kurson por lerni ŝakludon — dum rigardo al ludo de najbaroj ili spertiĝas.

La ĉina ŝako diferencas de la internacia ŝako. Ĝiaj pecoj sidas sur la interkruciĝoj, sed ne en la kvadratoj. La ĉina ŝako enhavas konfuceanisman ideon: la ĉefgeneralulo iras nur en la kadro de la palaco kiel imperiestro, dum en la internacia ŝako la reĝo povas iri ĉien; la asistantoj staras apude, montras la majestecon de la kortego; krom la ĉef-

generalulo, ankaŭ gvardianoj povas iri en la palaco, dum la elefantoj (ĉefministroj) rajtas iri nur apud la palaco; la ĉaroj, ĉevaloj kaj kanonoj militservas kun striktaj reguloj pri moviĝo, kio montras la tradician ĉinan agmanieron: ĝentila moviĝo, diferenco inter estro kaj subulo, inter junulo kaj maljunulo; en krizo, la soldato devas sin oferi por savi la ĉaron, kaj la ĉaro ĉiam pretas morti por savi la ĉefgeneralon, tio estas obeemo kaj lojaleco. Ŝakludo estas kvintesenco de la ĉina kulturo. Entreprenisto Ying Changqi el Taiwan promesis premion de miliono da usonaj dolaroj al tiuj neĉindevenaj sportistoj, kiuj ĉampioniĝos en internacia konkurso de ĉina ŝako, tamen ĝis nun neniu el ili gajnis la premion. Se vi konas la suprajn regulojn de ĉina ŝakludo, vi komprenos la kialon.

En la oficejo de Markizo kaj Duko oni havas unu horon por ripozo en tagmezo. Dekkelkaj ŝakludantoj ĉiutage ĝuas la tempon. Inter ili Markizo kaj Duko estas pli frenezaj amantoj. Ili havas malsamajn postenojn, tamen en la ludo ĉiu havas egalan rajton. Duko estas veterana oficisto. Li penas pruvi, ke ankaŭ en ŝakludo li estas elstara. Tiel li neniam akceptas konsilojn de aliaj kaj ofte diras: “Ne!” Markizo ofte petas sugestojn de aliaj, kvankam li ne kapablas elekti la plej taŭgan.

Duko multfoje venkis per sia obstineco. Do venki lin estas granda plezuro por multaj ŝakludantoj. En tagmezo multaj ŝatas elekti lin kiel rivalon. Por ludi kun li la unua, Markizo frue venas al la ĉambro de Duko.

Fakte ili ludas je meza nivelo. Ili ne konsultas librojn nek majstrojn. En la pasintaj jaroj ili ne havis rimarkindan progreson en ŝakludo. Kvankam ĉiutage ili faras preskaŭ samajn komencajn paŝojn, tamen multaj ŝatas rigardi ilian ludon, aŭ pli precize, ilian malcedemon.

Je la 7-a paŝo Markizo movis la soldaton laŭ ideo de majstro sugestita en televida programo. Tio mirigis la rigardantojn.



### Ŝakludo en tagmezo

“Estas epoko de reformado, mi ne estas escepto.” Markizo ĝojiĝis.

Duko tamen ne ŝanĝis sian ideon, intencante rapide venki Markizon. Laŭ instruo de majstro, Markizo kaptis ĉaron de Duko post kelkaj paŝoj. Tio ja estis granda perdo por Duko. Li penis aspekti trankvila kaj atendis la mispaŝon de Markizo, kiu ofte eraris en bona situacio. Duko fojerefoje diris al la rigardantoj: “Ne donu konsilojn al li.”

Tio kolerigis Markizon, kiu opiniis, ke la bonan situacion li ŝuldas al majstro, sed ne al la rigardantoj. “Mi klare vidis vian ruzon,” diris Markizo.

Li tamen faris eraron. Duko ĝoje kriis: “Jen mia vico!” Li kaptis la ĉaron de Markizo, kiu tuj stariĝis kaj intencis repreni sian ĉaron. Tamen tio ŝokis la regulojn. Duko alte tenis la ĉaron, kvazaŭ trezoron. Markizo perdis la memfidon kaj estis baldaŭ venkita.

“Morgaŭ mi revenos!” Markizo foriris. Eble li volis lerni ion de aliaj majstroj.

“La rezulto ne estas tre kontentiga...” Duko aspektis modesta, tamen lia ĝojo estis nekaŝebla. ■

### Feriado en la kamparo (Humuraĵo)

Post la unua tranokto la turisto diris al la bienestro: “Preskaŭ dum la tuta nokto mi ne povis dormi, ĉar porkino volis eniri en mian ĉambron, senĉese gruntis kaj gratis ĉe mia perdo.”

“Pri tio mi ne miras,” la bienestro diris, “ĉar ĝis hieraŭ nia porkino loĝis en tiu ĉi ĉambro.”

La ferioj en la kamparo ĉesis. La turisto demandis la farmiston: “Kiu vojo al la stacidomo estas la plej mallonga? Mi volas atingi la trajnon, kiu ekveturos je la 11-a horo.”

“Tio ne estas problemo. La plej mallonga vojo estas tra mia paŝtejo. Kaj se mia bovo vidos vin, vi ekkuros tiom rapide, ke vi atingos la trajnon eĉ je la 10-a horo.”

Felix Baumgart (Germanio)

## ĈINAJ GLAZURAĴOJ

Se vi faras birdorigardon al la Imperiestra Palaco en Pekino, vi vidos, ke sub la lazura firmamento okulfrapas impona domaro ĉirkaŭita de altaj ruĝaj muroj kaj tegmentita per glazuritaj tegoloj.

La glazuraĵoj ĉi tie aludas klinkeron, tegolon kaj vazon, unue glazuritajn kaj poste bakitajn. Ĝenerale ili, verdaj kaj flavaj, estas efikaj en rezisto kontraŭ akvo kaj erozio.

Estas ja longa la historio de bakado de glazuritaj objektoj. Oni esploris tegolan pecon trovitan en la ruino de Daming-palaco de Tang-dinastio kaj konstatis, ke komence estis nur verde glazurita tegolo kaj nur en la dinastioj Ming kaj Qing oni grandkvante uzis glazuritajn tegolojn en la konstruado de la Imperiestra Palaco, Templo de Imperiestraj Prapatroj, Teraso de Tero kaj Greno (simbolo de la ŝtato), Ĉiela Altaro, Kampanilo k.a. Sekve de tio oni multe bakis glazuritajn tegolojn, ĉar tiuj konstruaĵoj apartenis al imperiestroj kaj flavo simbolis imperiestrecon, tial aperis flave glazuritaj objektoj, kiuj poste produktiĝis pli kaj pli multe.

Naŭ-draka ekranmuro estas majstroverko de la ĉina glazura kulturo kaj ĝia arto. La Naŭ-draka Ekranmuro en la urbo Datong, Shanxi-provinco, longas 45.5 m, altas 8 m kaj dikas 2.02 m. Ĝi


sidas sur bela soklo kun reliefaj figuroj de leono, tigo, elefanto kaj fluganta ĉevalo versimilaj kaj diversformaj. Supre sur la muro estas tegmento kun larĝa rando kaj meze de ĝi 9 gigantaj drakoj dancante flugas en nuboj kaj ondoj. Oni diras, ke la glazuritaj klinkeroj, el kiuj formiĝis drakoj, estas faritaj el rivera koto, glueca rizo, uruŝio, ora pulvoro kaj multe da koloriloj.

Nun la antikva glazura arto estas aplikata ankaŭ en konstruado de modernaj domoj. La bakujo, destinita ekskluzive por la imperiestraj familioj, jam fariĝis moderna entrepreno, kiu ne nur disvolvis la tradician ĉinan arton, sed ankaŭ bakis kolosajn pejzaĝojn, malgrandajn 9-drakajn ekranmurojn k.a. el glazuritaj klinkeroj por Japanio, Kanado, Usono kaj Singapuro.

## TERMOFONTO

En Tengchong-gubernio, Yunnan-provinco, najbare de Birmo, estas termofonto.

Tie, en la valo etendiĝanta kelkajn kilometrojn, ĉiam ŝvebas varma vaporo super la verdaj herboj. En la tuta jaro, ĉu en somero ĉu en vintro, ĉu en tago ĉu en nokto, ĉiam regas varmo. Tie estas du naturaj naĝejoj el termofonto ligitaj unu kun la alia. El ili la granda profundas ĉ. 2 m., kiu ebligas plonĝon de sur roko, dum la malgranda profundas malpli ol unu metron kaj tie oni povas



Naŭ-draka ekranmuro en Datong

ripozi. Super la varma akvo kaj sub la lazura ĉielo ĉiam ŝvebas vaporo. Oni nomas la lokon Belulina Fonto. Bano en la fontakvo elŝprucinta el kratero de estingita vulkano estas tre utila al kuraco de pluraj malsanoj. Tie estas alia granda termofonto kun 5-metra diametro. En ĝi la akvo varmas eterne. Oni diras, ke tie la akva temperaturo atingas 96° C. La fonto estas ĉirkaŭita de ŝtona muro kun pluraj fendoj. Tieaj kamparanoj ofte kunvolvas plurajn ovojn per riz-tigoj kaj metas ilin en la fonton. Post kelkaj minutoj la ovojn kun aparte bona gusto estas kuiritaj. Oni vendas la kunvolvitaĵojn, unu el la specialaj produktaĵoj de la loko.

## GRANDA FAMILIO

La familio de kamparano Li Guanghai konsistas el 142 membroj. Ĝi estis registrita en Guinness kaj estas nomata la unua familio de la mondo.


S-ro Li estas 101-jara kaj lia edzino Wang Fangzhen 102-jara. Ili geedziĝis en 1916. Ili havas 4 filojn kaj 3 filinojn. El la familianoj la plej juna estas ilia 5a-generacia nepo, kiu aĝas malpli ol 6 monatojn. En la familio mortis nur ilia plej aĝa filino kaj ĉiuj ceteraj nun estas sanaj.

Ilia plej aĝa filo Li Mengyuan, 75-jara, diris, ke liaj gepatroj estas ĉiam bonhumoraj. Samvilaĝanoj diris, ke la maljunaj geedzoj ĉiam respektas unu la alian. Ili estas helpemaj ankaŭ al siaj najbaroj kaj neniam kraĉis post la dorso de aliaj. Kaj plie ili neniam insultis nek batis siajn posteulojn.

Li Guanghai altas 158 cm kaj pezas 56 kg, lia edzino altas 150 cm kaj pezas 42.5 kg. kun densaj grizaj haroj. Li Guanghai estas vigla, akrevida kaj klareaŭda. Li legas neniam kun okulvitroj. En la lastaj pli ol 30 jaroj ili neniam grave malsanis. Ifoje ili suferis de malvarmumo, sed sen preni medikamenton ili mem resaniĝis.

La maljuna paro bone observas la regulon en la ĉiutaga vivo: Ili enlitiĝas je la 9-a vespere kaj ellitiĝas je la 7-a matene. Post tagmanĝo ili siestas 2-3 horojn. Ilia ĉefa manĝaĵo estas rizo. Ili preferas frikasitan porkaĵon kaj gluecan rizon. Wang Fangzhen kutime trinkas iomete da mem preparita medicina vino antaŭ enlitiĝo, dum ŝia edzo ofte fumas tabakon kulturitan de li mem.

Fakuloj konstatis, ke la du maljunuloj vivas tiel longe, kio havas ian rilaton kun la loka ekologia medio. Ilia hejmo troviĝas en tre kvieta loko ĉirkaŭita de verdaj montoj plenaj de bambuoj. Tie la aero estas eterne freŝa. En la vilaĝo, kie loĝas la maljuna paro, vivas 300 familioj kun 130 homoj pli-ol-60-jaraj, el kiuj 80 jam superis la aĝon de 70 jaroj.



## Ĉinaj popolaj rakontoj

En la pasintaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis 8 libretojn de ĉinaj popolaj rakontoj, kaj en junio aperis la naŭa.

Monteto ekflugos kaj falos sur iun vilaĝon. Tion antaŭsciis "freneza" bonzo. Li avertis la vilaĝanojn pri la danĝero, sed neniu kredis lin. Kion li faris por savi la vilaĝon? Vi trovos solvon en la rakonto "Alfluginta monto".

Malriĉa fraŭlo trovis en sia kampo helikon kaj bredis ĝin en akvovazo en sia kuirejo. Kaj de tiam li ekhavis tagmanĝon pretan en sinsekvaj tagoj. Kiu kaŝe helpis lin? La rakonto "Heliko-knabino" diros al vi, ke tion faris knabino el la heliko.

Baleno havas truon sur sia kapo, tra kiu ĝi de tempo al tempo elŝprucigas akvon. Kiam kaj kiel ĝi ekhavis la truon?

...

Havu kaj legu la rakontojn, kaj kredeble ili interesos vin.

Formato 11x18 cm.

Distribuata de la Distribua

Fako de "El Popola Ĉinio"

Prezo: 4.00 USD.

Sendokosto: 1.00 USD.

# Regno forgesita de historio

**I**AM la historio ne estas justa. Ekz., inter la 24 historiaj libroj, kiuj preskaŭ enhavas la tutan historion de Ĉinio, ne troviĝas eĉ unu por la Okcidenta Xia-regno ekzistanta 200 jarojn. Eble tio ne estas kulpo de historiistoj. Antaŭ ol ili kolektis historiajn materialojn pri la regno, ĝi pereis en militoj kaj malaperis ankaŭ la regnantoj — dangŝjang-oj.

La Okcidenta Xia-regno postlasis multajn enigmojn al la postaj esploristoj, kiuj tamen ne forlasis serĉadon de ĝi malgraŭ ĝia blanko en historiaj materialoj. Dank' al la ruinoj de konstruaĵoj, la elterigitaj fragmentoj kaj la progresanta esplorado, iom post iom klariĝis la aspekto de la regno kaj plimultiĝis rakontoj pri ĝi.

## DANGŜJANG-NACIO KAJ ĜIA UNUA REGNESTRO

Antaŭ la fondiĝo de la Okcidenta Xia-regno, kiel ĝia ĉefa konsisto la dangŝjang-oj jam longe vivis en la okcidenta parto de Ĉinio. Ili ŝatis migradon kaj ĝenerale loĝis en loko kun akvo kaj herboj. Pro najbareco Dangŝjang-nacio estis profunde influata de la kulturo de Tubo (antikva Tibeto), precipe de budhismo. En la 7-a jarcento, por eviti aneksadon de aliaj nacioj, Dangŝjang-nacio transloĝiĝis orienten al la nunaj Ningxia kaj Shaanxi, kun

permeso de la imperiestro de la centra ebenaĵo. La imperiestro honore donis la familian nomon Li al la prapatroj de Li Yuanhao. En 1038 Li Yuanhao fondis la Okcidentan Xia-regnon, kiu daŭris dum la regperiodo de Song-dinastio (960-1279).

La ambicia Li Yuanhao konis budhismajn sutrojn kaj sciis la lingvojn hanan kaj tuban, lertis en pentrado kaj havis kreivecon. Bone edukita, li ŝatis de infaneco literaturon kaj arton. Kiel lingva geniulo li kreis la lingvon de Okcidenta Xia. Ĝiaj ideogramoj estis similaj al la han-aj pro influo de tiuj de Tang- kaj Song-dinastioj. Hodiaŭ, kiam oni foliumas klasikajojn el ideogramoj de Okcidenta Xia, oni diras: “Je la unua vido ĉiuj ideogramoj estas konataj, tamen fakte neniu estas konata.” Per la de li elpensitaj 6 000 ideogramoj Li Yuanhao postlasis malfacilaĵojn al la postaj fakuloj. Tion mi pritraktos sube.

## FORRAZI LA HAROJN

Li Yuanhao fondis la regnon intencante, ke ĝi disvolviĝu kaj neniam pereu. Por ke lia popolo karakteriziĝu per forta nacieco, li donis dekretojn “forrazi la harojn” kaj “ŝanĝi vestojn de Han-



Elterigita pentraĵo de la Okcidenta Xia-regno

nacio”. Li unue forrazis al si la harojn kaj ordonis ĉiujn popolan-  
ojn tion fari. Tiuj, kiuj ne faros tion en tri tagoj post ricevo de la dekretoj, estos mortigitaj. Sub lia devigo la dekretoj estis obeataj en la tuta regno. Finfine ĉiuj viroj estis senharaj kun orel-ringo kaj virinoj kun alta hartubero kaj harpingloj. Krome Li Yuanhao ordonis ŝanĝi la han-an portadon de “ruĝa vesto kaj nigra ĉapo” al sianacia portado de “blanka ĉemizo kun strikta veŝto ekstere, felta ĉapo kun ruĝaj subŝtofo kaj franĝo”. Li ankaŭ faris severan politikon por la vestoj de ŝtatoficistoj kaj ordinaraj popoloj. Kvankam similaj al tiuj de han-oj, la vestoj de ŝtatoficistoj de la Okcidenta Xia-regno konservis densan naciecon. Kaj la reformado de Li Yuanhao pri vestoj metis fundamenton por la vesta kulturo de la regno.

## KREADO DE LA IDEOGRAMOJ DE OKCIDENTA XIA

Li Yuanhao konsciis, ke la



vestoj nur en formo unuigis la dangŝjang-ojn, kaj por kunligi ilin en spirito li bezonis ion alian krom budhismo. Jen kial li kreis la ideogramojn de Okcidenta Xia.

En 1804 en Liangzhou (nun Wuwei) de Gansu, erudiciulo de Qing-dinastio trovis steleon kun ideogramoj de Okcidenta Xia. Tio tamen ne altiris sufiĉe da atento. Cent jarojn poste, en pagodo-tombo en Heicheng, Interna Mongolio, oni elterigis pli ol 8 000 dokumentojn de la Okcidenta Xia-regno, kiuj inkluzivas konfuceanisman kaj budhismajn klasikaĵojn, vortarojn, literaturaĵojn, leĝajn dokumentojn, medicinajn librojn, almanakojn, diagramojn kaj sorĉaĵojn. La elteriĝo vekis grandan surpriziĝon.

Tamen deĉifri la ideogramojn estis kaprompe. Surbaze de vortaro farita de regnanoj de Okcidenta Xia, fonetika transskribo de antikva hinda kaj tibeta lingvoj pri la lingvo de Okcidenta Xia, la esploristoj strukturis voĉan sistemon de la nomitaj ideogramoj; post multjara esplorado oni klare konis la gramatikon kaj etimologion de la lingvo de Okcidenta Xia. La klasikaĵo kun tibet-lingva fonetika transskribo temas ĉefe pri budhismo, ĉar la dek genera-

cioj da regnestroj adoris budhismon, precipe la tibetan budhismon. La klasikaĵo montras, ke la Okcidenta Xia-regno intime rilatis al Tubo kaj estis influata politike kaj ekonomie de Song-dinastio. Ekz., krom ĝiaj propraj moneroj, en la regno cirkulis ankaŭ moneroj de Song-dinastio.

## GRAVA MALKOVRO

Kvankam la ideogramoj de Okcidenta Xia ne estas tiel maturaj nek vivipovaj kiel tiuj de la ĉina lingvo, tamen ili estas grava atestaĵo de tipografio, unu el la kvar inventoj de la antikva Ĉinio.

La ĉina tipografio atingis la kulminon de sia disvolviĝo en Song-dinastio. Influate de tio, la Okcidenta Xia-regno grandnombre presis konfuceanisman kaj budhismajn klasikaĵojn en sia lingvo kaj la han-a lingvo. Inter la en Rusio konservataj klasikaĵoj en la lingvo de Okcidenta Xia troviĝis kvar specoj da tipografiaj budhismaj sutroj. Ĝis nun ankoraŭ ne troviĝis han-lingva sutro farita en Song- kaj Yuan-dinastioj, tiuokaze ili fariĝis pli raraj. En 1991 oni trovis 9 volumojn de budhismaj sutroj en la lingvo de Okcidenta Xia en Helan-gu-

bernio de Ningxia. Ĉinaj fakuloj konstatis, ke ili estas lignaj tipoj faritaj en la posta periodo de la Okcidenta Xia-regno. Ili ne nur estas la plej antikvaj lignaj tipoj konservataj en la mondo, sed ankaŭ atestas, ke jam en Song-dinastio oni inventis kaj ekuzis lignajn tipojn.


## ETERNA RIPOZEJO DE REGNESTROJ

La koncizan naskiĝjaron de ligna tipografio ne povis diri al ni Li Yuanhao kaj liaj posteuloj. Ili, la 9 generacioj da regnestroj de Okcidenta Xia, kuŝas en la maŭzoleoj ĝis nun ankoraŭ imponaj.

Tiuj maŭzoleoj, en formo de piramido, situas ĉe la piedo de Helan-montaro en la okcidenta antaŭurbo de Yinchuan, ĉefurbo de la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono. Oni trovis ilin komence de la 70-aj jaroj. En dezerto kun areo de 50 kvadrataj kilometroj sidas 9 maŭzoleoj de regnestroj kaj 200 tomboj de alt-ranguloj. Kiel restaĵo de la regno la tombaro estas bone konservata.

Ĉiu maŭzoleo, rigardanta al sudo, estas kompleta konstruaĵaro. Ĝi, ĉirkaŭita de muroj, konsistas el du partoj ekstera kaj interna. Ĉe ĉiu angulo estas turo; en la antaŭa parto estas du simetriaj terasoj kaj tri kioskoj, en kiuj staras steleoj kun ideogramoj de Okcidenta Xia kaj hanoj, kiuj prikantas la regnestrojn. Antaŭ la centro de la interna parto estas templo por oferado, malantaŭ ĝi estas kvin- aŭ sep-etaĝa stupao.

La konstrua stilo de la maŭzoleoj unuflanke estis influata de tiu de Tang- kaj Song-dinastioj kaj aliflanke portas siajn naciajn ecojn. Ekz., la stupaoj spegulas, ke la regnestroj kredis je budhismo, sed la nombro de kioskoj estas nepara — tio ne sekvas la simetrian de la tradicia ĉina arkitekturo. ■



Maŭzoleo de unu el la regnestroj de Okcidenta Xia

# Verkisto-urbestro

**T**AGE li estas tre okupita urbestro, kiu devas gvidi siajn urbanojn sin feliĉigi. Nokte, li estas verkisto, kiu regalas la legantojn per romanoj kaj televidaj filmoj.

Li estas Li Taiyin, 54-jara. En 1962, diplomitiĝinte el mezlernejo, li ricevis akceptilon de fakultato de ĉina literaturo de instruista universitato kaj tiun de voĉmuzika fakultato de konservatorio. Li senhezite elektis la unuan, ĉar li revis fariĝi verkisto.

Tamen li iĝis ŝtatoficisto. El vilaĝa kadro iom post iom li fariĝis urbestro de Suining, kiu situas en la mezo de Sichuan-baseno. Kiam Li Taiyin ekfunkciis kiel urbestro, Suining estis postĝinta en ekonomio pro la fermiteco. Li ekpraktikis pordmalferman strategion. Suining nun estas trafika nodo kaj komerca centro en meza Sichuan. Ekonomie ĝi estas strikte ligita kun diversaj lokoj de Ĉinio kaj starigis dekojn da entreprenoj kunlabore kun Japanio, Usono, Britio kaj Hungario.

La loka registaro havas multajn funkciojn, tiel la urbestro estas la plej okupita homo. Por verkado li havas nur tre malmulte da horoj. Li tamen opinias, ke la urbestra ofico riĉigas lian verkadon, kaj la verkado siaflanke helpas la registaran aferon. La du okupoj konsistigas lian vivon.



Li Taiyin

Suining havas malmulte da agroj kaj multe da laborfortoj. Komence de la 90-aj jaroj, multaj malriĉaj kamparanoj deziris fariĝi urbano, kiu rajtas fikse loĝi en urbo, havi stabilan postenon, ricevi de la registaro loĝdomon kaj aliajn favorojn. Fariĝi urbano estas malfacile por kamparanoj. Ĉar en Ĉinio estas tiel multaj kamparanoj, sukcesas nur tiuj, kies kondiĉoj konformas al la koncernaj principoj. Iuj junaj kamparaninoj forlasis la vilaĝon pere de edziniĝo al urbano. Tamen iuj el ili multe suferis post edziniĝo. Por averti la aliajn, Li Taiyin verkis novelon "Ŝi mortis en printempo". Poste oni adaptis la novelon al televida filmo, kiu estis elsendita de multaj televidoj tra la tuta lando kaj vekis vastan atenton. Kiel urbestro, li havas la taskon ne nur verki

literaturaĵojn, sed ankaŭ en la reala vivo trovi vojon por la suferantoj, elirigi la superflujajn laborantojn el malriĉeco. Li multe kontrolis la socian vivon kaj kreis "4.3.3-sistemon": 30% da kamparanoj laboru en aliaj lokoj; 30% laboru en la vilaĝaj entreprenoj kaj 40% kulturu teron en la hejmloko. Nun la kamparanoj, kiuj laboras en urboj, ĉiujare sendas hejmen miliardon da juanoj. Tio multe helpis la lokajn entreprenojn kaj en la tuta urbo aperis 160 000 entreprenoj vilaĝaj kaj privataj. Ilia produktovalorokreskis de miliardo da juanoj en 1992 al 9.5 miliardoj en 1995, kiuj konsistigas pli ol duonon de la totala nacia produktovalorode la tuta urbo. Dank' al la diligenta laboro de la terkulturantoj, Suining fariĝis grava produkto de greno, kotono, oleo kaj porkoj.

Li Taiyin ĉiam zorgas pri la popoloj kaj penas feliĉigi ilin. Maje de 1994, Suining suferis de trosekeco. Mankis akvo por trinkado kaj irigacio. Tiam li kuŝis en hospitalo, tamen li hastis al la lokoj, kie oni plej multe suferis de trosekeco. En la hospitalo li informiĝis, ke estas malfacile por la kamparanoj ricevi kuracadon, li okazigis kunsidon de la urba registaro kaj decidis konstrui novan kuracejon. Iu 30-jara doktoro-instruisto de altlernejo estis atakita de kancero. Informiĝinte pri tio, Li Taiyin korsiĝis. Li multfoje vizitis la junan malsanulon. Por ke la similaĵoj ne okazu, Li Taiyin ordonis, ke la koncerna departemento faru fizikan ekzamenon al la urbaj ŝtatoficistoj en difinita tempo ĉiujare.

Li abomenas fiagojn de iuj ŝtatoficistoj, kiuj ĉasas privilegion per sia posteno. Unu el liaj romanoj kritikas tian fenomenon. Lia nova rikolto estas: romano pri junaj kamparanoj, kiuj laboras en urbo; teksto de 20-parta televida filmo; kolekto de noveloj. ■

# Ĉinaj aviadiloj

En la komenco de la 20-a jc. oni unuafoje sukcese faris flugadon per aviadilo. La ĉina aviadila produktado komenciĝis post la naskiĝo de la nova Ĉinio en 1949 kaj progresas rapide. Ĉinio mem povas fari transportan kaj alispecajn aviadilojn, kiuj kontribuas al ĝiaj nacidefendo kaj ekonomio. Tiu ĉi poŝtmarkoserio konsistas el 4 pecoj. Ĝi estis emisiita de la Ĉina Poŝta kaj Telekomunika Ministerio en 1996.



# Ĉinaj aŭtoj



En 1956 Ĉinio produktis sian unuan kamionon kun marko Jiefang kaj per tio finis la historion, ke la ĉinoj ne kapablas produkti aŭtojn. En la pasintaj 40 jaroj Ĉinio per siaj propraj fortoj fabrikis personaŭtojn kun marko Hongqi, kamionojn kun marko Dongfeng kaj pekinajn leĝerajn aŭtojn. Lerninte alilandajn avangardajn teknikojn, ĝi fabrikis leĝerajn kamionojn kun marko Jiefang. Tiu ĉi poŝtmarkoserio konsistas el 4 pecoj. Ĝi estis emisiita de la Ĉina Poŝta kaj Telekomunika Ministerio en 1996.



Krakovo — malnova  
urbo  
de **SLAWOMIR  
SZYMALA** (Pollando)



Pejzaĝo en  
Alpa-montaro  
de **RUDOLF SKORUPPA**  
(Germanio)

ISSN 0032-4361

